

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:

kronoj 3.⁰⁰ = germ. markoj 3.³⁰ =
frankoj 4.²⁵ = rejsoj 800 = rubloj 1.⁵⁰.

Pago por anoncoj:

15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

Uppsala.

Okt.—Nov. 1896.

N:o 10—11.

De la redakcio.

En nia N:o 4 ni invitis la legantojn de "Lingvo Internacia" skribi al ni pri ĉio, kion ili trovas nebona en nia gazeto. Ni faris tiun ĉi inviton, dezirante ke "Lingvo Internacia" povu kiel eble plej bone plenumi la rolon, kiun ĝi devas plenumadi, t. e. servi kiel centra organo de la esperantistoj, helpi la progreson de Esperanto kaj tiamaniere pligrandigi la nombron de ĝiaj anoj. Bedaŭrinde niaj amikoj ne tro rapidis respondi nian inviton kaj ĝis nun ni ricevis nur unu solan detalan leteron, tuŝantan la programon de nia gazeto. Tiu ĉi letero apartenas al s-ro Rakitski kaj ni kun plezuro presas ĝin, esperante, ke inter niaj legantoj troviĝos ankaŭ aliaj, kiuj skribos al ni pri nia programo tiel same sincere kaj malkaŝe, kiel ĝin faris s-ro Rakitski.

"En la aprila numero de nia gazeto — skribas nia korespondanto — la redakcio petis siajn abonantojn, ke ili malkaŝeme elparoladu al ĝi opiniojn pri tio, kio plaĉas aŭ ne plaĉas al ili en la gazeto. Tiu ĉi ago de l' redakcio estas tre bona kaj prudenta. Unu rusa proverbo tute vere diras: 'unu saĝo estas bone, sed du saĝoj estas pli bone'; kelkaj da dekoj aŭ centoj da saĝoj sendube estas ankoraŭ pli bone. Kaj se la redakcio sekvos tiun ĉi saĝegan regulon, se ĝi atente aŭskultados la opiniojn kaj konsilojn, elparolatajn al ĝi de l' abonantoj, — tio ĉi gardos ĝin kontraŭ multaj eraroj, kontraŭ kiuj neniu estas asekurita. Al mi ŝajnas, ke la redakcio faris unu el tiaj eraroj, dirinte en la prova numero de la gazeto interalie la jenon: 'Nia lingvo aperas tie, kie oni sentas bezonon je ĝi kaj kiam malaperas la bezono, malaperas ankaŭ la lingvo!' — Ĉu efektive la redakcio pensas, ke la celo de internacia lingvo estas nur faciligi reciprokajn komunikigojn de l' diversnaciaj homoj en iliaj pure personaj malgrandaj aferetoj, ekz. komercaj, kolektistaj k. t. p., aŭ liveri amuzon al la senokupitaj homoj (vidu N:o 3 de la gazeto, 1896, p. 33)? Ĉu efektive la redakcio volas aldoni al nia lingvo tian mallarĝan, pure praktikan signifon? Kompreneble, se la lingvo Esperanto havus nur tiun ĉi celon, se ĝia signifo estus sole en tio ĉi, tiam ĝi meritis

neniam atenton de seriozaj homoj kaj ĉiuj pli bonaj niaj amikoj, pli agemaj, pli aldoutaj al la afero, forlasus ĝin, vidante ke la ludo ne kostas kandelojn. Ĉu efektive homo pensanta sane, kiu neniam sin okupos per la komerco aŭ per la kolektado de iaj objektoj, ne vojaĝos, unuvorte, ne havos aferon kun la homoj de aliaj nacioj, ĉu efektive tia homo laboros, oferos tempon, fortojn kaj monon por la utilo de internacia lingvo, kiu estas kreita prefere por oportuno de iaj komercistoj, kolektistoj kaj homoj, vojaĝantaj pro senokupeco? Ne, niaj amikoj, laborantaj por la utilo de nia afero, celas tute alian. Ni laboras por nia lingvo, kredante kaj esperante, ke al ni iam prosperos ellabori idealan lingvon senkompare pli bonan ol ĉiuj nunaj naciaj lingvoj. Ni ne celas elpeli el la uzado la ekzistantajn naciajn lingvojn. Ne, ni celas tion, ke la homoj de diversaj nacioj, havante por sia hejma uzado sian parencon nacian lingvon, havu ankaŭ unu komunan internacian lingvon, kiun oni povus ellerni preskaŭ sen laboro, sed kiu estus egale oportuna por scienco, arto kaj por la negocaj interkomunikoj. Ni esperas, ke ellaborinte tian lingvon, ni iam tradukos en ĝin ĉion, kio estus la plej bona en la produktaĵoj de l' homa saĝo, ĉion, kio estas la plej bona en ĉiuj nuntempaj naciaj literaturoj, kaj ankaŭ gardos nian lingvon kontraŭ ĉio triviala, malpura, malalta, malnobla, kaj tiamaniere havos la plej riĉan kaj la plej noblan en la mondo literaturon, kiu kunigos en si ĉiujn florojn de literaturaj kaj sciencaj produktaĵoj, ĉion puran, ĉion altan, kio estis iam esprimita en homaj lingvoj. Ni celas kolekti ĉion tion ĉi en unu komunan trezoron, atingeblan por ĉiuj. Jen por tia ideo estas inde labori, estas inde oferi tempon, kaj laboron, kaj sanon, kaj lastan monon. Ĉiuj veraj esperantistoj havas tiun ĉi ideon, kaj ĝi donas al ili forton por alporti al ilia afero grandajn oferojn. Mi, kompreneble, scias, ke nia estiminda redakcio ankaŭ havas tiun saman ideon, kaj se ĝi penas kaŝi ĝin kaj eldiras aliajn mizerajn ideetojn, ĝi faras tion nur ĉar ĝi volas kontentigi la malgrandajn hometojn, kiuj ne estas kapablaj kompreni kaj akcepti la grandan ideon kaj por kiuj nur malgranda ideeto estas laŭforta. La redakcio havis ĉe tio ĉi bonan, sed, laŭ mia opinio, ekstreme eraran celon.

En la marta numero de la gazeto la redakcio interalie diras la sekvantan: "La praktiko montris, ke la nombro da homoj, kiuj deziras aliĝi al ia afero *pro la ideo*, estas tre malgranda, kaj se vi diras al la mondo: lernu, faru, promesu aŭ simile, vi preskaŭ ĉiam renkontas surdajn orelojn. La nova (propaganda) broŝuro postulas nenion, sed diras en praktika maniero: se vi volas havi la personan utilon kaj amuzon, ke personoj de plej diversaj landoj kaj nacioj povu komuniĝadi kun vi, enskribu vin en la nombron de la personoj, kiuj konsentas akceptadi leterojn en Esperanto". Tiamaniere la redakcio volas kontentigi iujn malgrandajn hometojn kaj, por altiri ilin al sia flanko, proponas al ili partopreni en nia afero, amuzante sin per nia karega trezoro, per nia Esperanto. Ne, ni ne bezonas tiujn ĉi homojn, ni ne bezonas tiujn, kiuj ne povas forlogi sin per nia granda ideo. Ili ne estas niaj kolegoj. Ni kaj nia afero havos de ili malmulte da utilo. Pli bone estos, ke kun ni restu nur tiuj malmultaj homoj, kiuj estas kapablaj forlogi sin per la ideo. Tiuj ĉi estas niaj veraj amikoj, kaj ili neniam forlasos nin kaj nian aferon. Ili jam multe oferis kaj oferas por nia afero, kaj, se ĝi estos bezona, kune kun ni ili oferados ankoraŭ pli multe. Restu kun ni eĉ malmultaj, sed veraj, fidelaj amikoj, je kiuj ni tute povas esperi. Kaj ni ne malgrandigu, ne malaltigu kaj ne aliigu nian ideon. Ni eldiru ĝin antaŭ tuta la mondo kuraĝe, malkaŝe kaj honeste. Ni nin tenu kun indo, ne flatu.

ne malaltiĝu, — kaj la mondo eksentos pli da estimo al ni kaj al nia afero. Ni ne petegu kaj ne tre penu altiri al ni iun: Kiu volas aliĝi al ni, kiu volas partopreni en nia bona, honesta afero, tiun ni kore petas aliĝi, sed kiu ne volas, — tiun ni ne bezonas. Ni ne estu konfuzataj de tio, ke oni mokos nin kaj nian aferon. En la tuta mondo ne ekzistas io granda kaj belega, kion oni ne povus moki. Kaj ju pli alta kaj belega estas la afero, des pli da mokoĝi renkontas de la malamikoj de l' lumo kaj de l' bono. Ni ne estu konfuzataj ankaŭ de tio, ke nin mokos la homoj de scienco kaj la fortaj de tiu ĉi mondo. La homoj de scienco ofte estas la plej rutinaj, la plej difektitaj de antaŭjuĝoj, kaj ofte aperas kiel malamikoj de bona kaj granda afero. En la historio de nacioj ĉiu povas trovi multe da similaj ekzemploj. Ni rememoru nur pri Kolumbo kaj pri la instruituloj de Salamanka, pri Galileo kaj pri liaj instruitaj juĝistoj. Ni ne estu konfuzataj de tio, ke oni nin nomos utopiistoj, kaj nian grandan aferon -- utopio. Ni rememoru, ke multaj grandaj ideoj, kiuj jam antaŭlonge efektiviĝis, estis iam opiniataj kiel utopioj preskaŭ de ĉiuj homoj. La detruo de l' sklaveco, la estimo al la virinoj kaj multe da alio iam ŝajnis neefektiviĝebla, neatingebla kaj estis nomata utopio, kaj tamen venis la tempo, kaj ĉio tio ĉi efektiviĝis. Kaj se ĉion bonan kaj honestan, sed malfacile atingeblan oni nomas utopio, tiam Kristo kaj liaj sanktaj apostoloj estis la plej grandaj utopiistoj, ĉar ili predikis kaj penis enkonduki en la vivon tion, kio estas la plej bona kaj la plej malfacile atingebla. Kaj ni, karaj amikoj, ni malkaŝe kaj kuraĝe rapidu al nia celo, diligente laboru kaj oferu ĉion, kion ni povas, por ĝin efektiviĝi, kaj Dio nin helpos, kiel li helpas ĉian bonan aferon.

M. F. Rakitski."

Tiamaniere s-ro Rakitski pensas:

1) ke la celo de nia afero estas ellabori bonan kaj facile ellerneblan lingvon; kolekti en tiu ĉi lingvo ĉion bonan, kion enhavas la produktoj de l' homa saĝo, kaj gardi ĝin kontraŭ ĉio malbona:

2) ke la redakcio de "Lingvo Internacia" havas la saman finan celon:

3) ke ĝi tamen ne deziras ĝin esprimi malkaŝe, ĉar

4) ĝi timas per tio ĉi deturni de nia lingvo hometojn, nekapablajn kompreni grandajn ideojn.

Ni opinias, ke s-ro Rakitski eraras, kiam li difinas la celon de nia afero kaj ke li alskribas al ni intencojn, kiujn ni ne havis efektive.


Antaŭ ol meti al si ian celon, oni devas konvinkiĝi, ke la celo estas laŭforta kaj atingebla. Kolekti en nia literaturo ĉion bonan, noblan k. c. estas tre malfacile, ĉar kio estas bona por unu persono, tio, eble, ne estas bona por la alia, kaj kiam ni parolas pri la bono, ni devas montri, kion ni nomas bona kaj de kies flanko ni rigardas la aferon. Ekz. ia komerca vortaro estas tre bona por komercistoj; por ni ĝi estas tute senutila. Ni antaŭvidas, kion diros al ni pri tio s-ro R. — li diros, ke bona estas tio, kion nomas bona la homoj, ne hometoj. Bedaŭrinde ni ne scias diferencojn inter homoj kaj hometoj: ĉiuj, kiuj marŝas per du piedoj kaj parolas ian lingvon, por ni estas homoj. Sed ni eĉ supozu, ke ni plenumis la unuan duonon de la problemo: la facila lingvo ekzistas kaj ni tradukis en ĝin ĉion, kion nur iam iu nomis aŭ opiniis bona. Ni devas ankoraŭ, kiel pensas s-ro R., *gardi* nian trezoron *kontraŭ ĉio malbona*. Kiamaniere ni gardos? Malpermesante eldonadi ion malbonan? Persekutante la eldonistojn de l' malbono? . . . Sed se ni ne havos la eblon por gardi nian literaturon kontraŭ la malbono, tiam ĝi tute similos la naciajn

literaturojn, kie bono miksiĝas kun malbono, kaj la granda ideo de s-ro R. restos neefektivigita kaj neefektivigebla.

La celo de la redakcio estas tre difinita, klara kaj simpla: ni pensas, ke *Esperanto estas bono por ĉiuj*, ĉar plifaciligante la internaciajn komunikiĝojn ĝi donas la eblon al ĉiu homo komunikiĝi kun tia mondo, kiu nun estas fermita por li, dank' al la diverslingveco: uzante nian lingvon la homo pli facile trovas tion, kion li bezonas aŭ deziras: komercaĵon, agenton, malnovan poŝtsignon, karan amikon, kunideanon, akompananton en vojaĝo k. t. p. Ni pensas ankaŭ, ke la komunikiĝoj internaciaj kondukas al la amikeco de popoloj, donante la eblon al homoj de unu nacio ekkoni la homojn de alia nacio, eniri en certa grado en ilian vivon, ekvidi en ili siajn proksimulojn kaj meti ligojn de amikeco kaj amo tie, kie nun ekzistas nenio. Vastigadi la lingvon Esperanto, konvinkadi vorte kaj afere la homojn, ke la progreso de Esperanto estas bono de Ĝ homaro, malkovri la okulojn de tiuj, kiuj havas la okulojn sed kovras ilin antaŭ nia afero — jen estas nia celo, kaj ni pensas, ke por tiu ĉi celo estas inde batali, oferi tempon, forton kaj la lastan moneron. La homaro tre ofte ne komprenas sian propran utilon: ni rememoru, kion oni faris por propagandi la inokuladon de Ĝ variolo, malgraŭ tio ke la utilo de tiu ĉi inokulado estas pli okulvidebla, pli palpebla, ol la utilo de ellernado de Esperanto. Ĉu ni diros al tiuj, kiuj ne komprenas sian propran utilon, "iru for de ni, ni vin ne bezonas"? Ĉu oni devis antaŭ centjaro lasi trankvile morti pro variolo tiujn, kiuj ne deziris inokuli ĝin, lasi ilin infekti la aliajn? Ne, mil fojojn ne, kaj ni ankaŭ ne lasu trankvile tiujn, kiuj ne deziras lerni Esperanton kaj tiamaniere malfaciligas la internaciajn komunikiĝojn entute. Ni konvinkadu ilin, ni instruu ilin per ekzemploj, ni logu ilin eĉ per amuzoj kaj ni ĉiam memoru, ke ne ni bezonas ilin, sed ili bezonas nin, kiel malsanulo bezonas kuraciston.

Tiel ni pensas, kaj se ni eraras, ni petas, ke oni montru al ni, en kio ni eraras.

La redakcio.



El Heine.

I.

Ho, min ne timigis, je Di.
Ĉi tiu letero, la lasta.
Vi amon rifuzas al mi —
Kaj via leter' estas vasta!

Longega letero! dekkvin
Paĝegoj al pli ne amata!
Sed ĉu oni skribas, fraŭlin',
Tiome al hom' eksigata?


II.

Vi ne timu, mian amon
Ne divenos homa fam',
Se eĉ laŭte, bel-fraŭlino,
Kantes mi pri mia am'.

Inter floroj de arbaro
Tre kaŝita, en silent'
Kuşas la sekreta flamo,
Mia bongardata sent'.

Se el ĝi eĉ elmetiĝos
Fajrerato, tion ĉi
Ja ne kredos homoj: ili
Prenos ĝin por poezi'.

A. Kofman.



Pri la "Biblioteko".

D:ro Zamenhof petas nin presi la sekvantan sciigon:

"Tre malfavoraj financaj cirkonstancoj devigas min bedaŭrinde ĉesi la eldonadon de la 'Biblioteko'. La kajero 'El la vivo de esperantistoj' estas la lasta, kiun mi eldonis. La abonantojn, kiuj ne pagis ankoraŭ por ĉiuj kajeroj, mi kore petas, ke ili volu alsendi al mi la pagon por la ricevitaj kajeroj.

Estante nun tre okupita por iom rebonigi mian personan situacion, mi petas, ke niaj amikoj volu pardoni al mi, se mi nun en la daŭro de kelka tempo devos esti neakurata en la korespondado, ĉar mankos al mi la tempo por skribi multe da leteroj. Pro tiu ĉi sama kaŭzo mi devas nun interrompi la eldonadon de la ĉiunonataj Provizoraj Adresaroj, kaj mi eldonos ĉiujn kolektitajn adresojn de esperantistoj en Februaro aŭ Marto de 1897.

Kun ĉiuj demandoj, proponoj, helpoj kaj oferoj oni volu sin turnadi al s-ro V. Gernet en Odeso.

L. Zamenhof."

Pro ke la eldonado de la Biblioteko ne estu interrompata, s-ro V. Gernet, kun permeso de d:ro Zamenhof, ŝargis sin per ĉiuj klopodoj por aranĝi la aferon. Kun la helpo de kelkaj niaj amikoj li ellaboris la sekvantajn kondiĉojn, en kiuj la Biblioteko estos eldonata dum la unua tempo:

1) La "Biblioteko de la lingvo internacia Esperanto" estas eldonata en la lingvo Esperanto en la formo de apartaj kajeroj kaj enhavas:

- a) originalajn kaj tradukitajn verkojn literaturajn en prozo kaj en versoj;
- b) verkojn populare-sciencajn, prefere filologiajn kaj geografiajn;
- c) specialajn sciencajn kaj teknikajn vortarojn de la lingvo Esperanto;
- d) vortarojn nacie-esperantajn kaj esperante-naciajn;
- e) lernolibrojn de la lingvo Esperanto en diversaj lingvoj.

2) La kajeroj de la "Biblioteko" eliras en nedifinita tempo. Dum unu jaro eliras ne malpli ol 20 kaj ne pli ol 50 presaj folioj po 16 paĝoj de ordinara formato.

3) La redaktoro de la "Biblioteko" estas s-ro A. S. Kofman (Rusujo, Odeso, Neĵinskaja, 34); al li oni devas sendi la manuskriptojn, difinitajn por la "Biblioteko".

4) La administratoro de la "Biblioteko" estas s-ro V. Gernet (Rusujo, Odeso, Puŝkinskaja, 44); al li oni devas sin turni kum ĉio tuŝanta la eldonadon kaj la abonadon de la "Biblioteko".

5) La aŭtoro aŭ tradukinto de verko, presita en la "Biblioteko", ricevas senpage 100 ekz. de tiu kajero, en kiu la verko estas presita.

6) Oni povas aboni la "Bibliotekon" en la sekvantaj kondiĉoj:

a) sendi al unu el la personoj, nomitaj en la punkto 9 sian adreson kaj la pagon por ne malpli ol 10 presaj folioj (160 paĝoj). Tiu ĉi pago estas: en Francujo — 2 fr. 50 c. por 160 paĝoj; en Germanujo — 2 markoj; en Portugalujo — 600 rejsoj; en Rusujo — 1 rublo; en Svedujo — 2 kronoj.

Rimarko. — Kiu abonas 10 ekzempleroj de la "Biblioteko" aŭ kiu sendas la antaŭpagon por 100 presaj folioj (1600 paĝoj), tiu ricevas 10 foliojn *senpage*.

b) sendi al unu el la samaj personoj sian adreson kaj sciigi pri sia deziro aboni la "Bibliotekon", promesante alsendi la pagon post la ricevo de ĉiu 10-a folio. Nur en tiu ĉi okazo la pago estas $1\frac{1}{2}$ -oble pli granda, t. e. 3 fr. 75

e. por Francujo, 3 markoj por Germanujo, 900 rejsoj por Portugalujo, 1 r. 50 k. por Rusujo, 3 kronoj por Svedujo.

7) Persono, kiu abonis la "Bibliotekon" sen antaŭpago, ne alsendis la monon en la definita tempo, t. e. post la ricevo de l' 10-a folio, kaj ne respondis la memorigon de l' administracio, perdas por ĉiam la krediton de l' administracio.

8) Abonanto, kiu ne deziras plu abonadi la "Bibliotekon", devas ĝustatempe sciigi pri tio la administracion kaj unutempe pagi ĉiujn siajn ŝuldojn al la "Biblioteko", se li ilin havas.

9) La "Biblioteko" oni povas aboni: en Francujo — ĉe s-ro L. de Beautroux (Epernay, Marne); en Portugalujo — ĉe d-ro Costa e Almeida Rezende); en Rusujo ĉe s-ro Gernet (Odese, Puŝkinskaja, 44); en Svedujo — ĉe la Klubo Esperantista en Upsalo: la abonantoj el aliaj landoj devas sin turni al s-ro Gernet.

10) Oni povas pagi por la "Biblioteko" per la monaj kaj neuzitaj poŝtaj signoj de ĉiuj landoj.

11) Eldonanto de la "Biblioteko" estas ĉiu persono, kiu sendos al s-ro Gernet ne malpli ol 25 frankoj ĉiujare ĝis tiam, kiam la "Biblioteko" bezonos novian materialan helpon, — t. e. kiam la enspezoj de la "Biblioteko" sufiĉos por kovri ĝiajn elspezojn, — aŭ kiu sendos al li unutempe ne malpli ol 100 frankoj.

12) La nomoj de la eldonantoj estas presataj sur la titola paĝo de ĉiu kajero de la "Biblioteko".

12) Kiam la "Biblioteko" donos profiton, tiu ĉi profito estas dividata inter ĉiuj eldonantoj kaj ĉiu el ili ricevas la parton, proporcian al la enportita de li kapitalo kaj al la tempo, dum kiu oni uzis tiun ĉi kapitalon.

13) Kiam la nombro de la eldonantoj estos ne malpli ol 5, ili tiam elektados ĉiujare per absoluta plimulto da voĉoj la redaktoron de la "Biblioteko", difinos la abonpagon kaj havos la rajton ŝanĝi la kondiĉojn de eldonado.

14) Tiuj ĉi kondiĉoj estos presataj sur la kovrilo de ĉiu kajero de la "Biblioteko". Pri ĉiuj ŝanĝoj de tiuj ĉi kondiĉoj oni anoncas en "Lingvo Internacia".

15) La nomoj de la abonantoj estos presataj sur la kovriloj de la kajeroj de l' "Biblioteko".

Ni ne bezonas diri, kiel grava estas la Biblioteko por la progreso de nia lingvo: sendube niaj amikoj mem komprenas la signifon de la ebleco konstante eldonadi novajn verkojn en Esperanto, eldonadi ankaŭ lernolibrojn kaj vortarojn, t. e. la verkojn por la propagando kaj por la regula uzado de Esperanto kaj kies eldonado ĉiam renkontis netraireblan baron en la ĉiama manko da mono. Ni kredas, ke ĉiuj veraj amikoj de nia afero ne deziros lasi pereii tiel gravan por ni entreprenon, kiel estas la "Biblioteko", kaj venos al ni kun sia laŭforta helpo, abonante la "Bibliotekon", propagandante ĝin, verkante kaj tradukante por ĝi, — ni kredas ĝin, kaj nur tial ni kuraĝas entrepreni la aferon, por kies plena efektivigo ni nun havas nek sufiĉe da fortoj, nek sufiĉe da mono.

Ĝis nun la sekvantaj personoj fariĝis eldonantoj de la "Biblioteko": s-ro d-ro Costa e Almeida, s-ro V. Gernet kaj s-ro A. Zakrjĵevski.



El Francujo.

Pri la filatela vortareto.

La artikoloj presitaj en la L. I. kaj en du aliaj gazetoj aliris al mi la sekvantajn mendojn: Henry de Martin, 1 — V. Gernet, 50 — Delon, 1 — Sino Helfer, 1 — da Costa e Almeida, 25 — Le Mazurier, 1 — Erfurt, 5 — Elberg, 1 — Abbeychettiar, 1 — Arduin, 1 — Abesgus, 2 — Cermak, 1 — André Lemaire, 2 — Geoghegan, 8 — Evstifejev, 1 — Ender, 1 — Kune: 102.

Tiu rezultato donas al mi bonan esperon. Sed bedaŭrinde ĝi estas ankoraŭ tute nesufiĉa, por ke mi povu entrepreni la intencitan eldonon. Mi ree atentigas la legantojn pri miaj artikoloj presitaj tie ĉi en la nroj 5 kaj 6—7. Mia verketo interesas ne sole la filatelistojn, al kiuj ĝi estas speciale dediĉita, sed ankaŭ iom ĉiujn esperantistojn per ĝia karaktero de lernolibro *tehnika*. Ne forgesu ni, ke nia lingvo estos akirinta ĝian tutan forton, sole kiam ekzistos grandaj vortaroj plenaj en la ĉefaj lingvoj, kaj ke la plej bona rimedo por pretigi tiajn vortarojn kaj faciligi ilin, estas fari iom post iom specialajn vortaretojn. Mi volis doni la ekzemplon, kaj, por ke mia ekzemplo estu samtempe laboro direkte profita, mi faris vortareton uzeblan de kategorio da homoj tre internacia. Sed por ke la ekzemplo donu ĝiajn fruktojn, por ke samtempe ĝi povu esti gvidanto, estas necese ke ĝi estu publikigita: tial mi ne timas rememorigi la amikojn ke mi atendas de ili la helpon kiun ili neniam rifuzas en tiaj okazoj: mendi unu aŭ du ekzemplerojn estas nenio por la mendanto; por mi, tio estas multe; ĉar kunigante, unu, du, kvin fine donas la sumon necesan.

La kosto estos ĉirkaŭe 50—75 centimoj (laŭ la nombro de la mendoj). Por la detaloj, revidu la suprediritajn artikolojn.

René Lemaire,

29, rue Léger Bertin. Epernay (Marne).

Letero de s:ro L. de Beaufront.

La kongreso en Buda-Pest, pri kiu mi parolis iom en antaŭirinta folio, ne restis senfrukta por nia afero. Dank' al la duobla agado de niaj varmaj amikoj, sinjoroj Houzeau de Lehaie kaj G. Moch, la dirita kongreso elektis komitaton, por ekzameni la demandon pri lingvo tutmonda. Dum tiu ĉi jaro la membroj de l' komitato pripensos kaj konsiliĝos, preparante raporton, kiu estos prezentata al la venonta kongreso de 1897. Komprenoble ni ne povas antaŭdiri nek la konkludon de l' raporto, nek la decidon de la estonta kunsido. Sed ni povas nutri grandan konfidon pri la rezultato, ĉar sinjoro Moch estas la raportanto kaj sinjoro Houzeau de Lehaie unu membro de la komitato. Cetere, dum la lasta kunsido, niaj du amikoj preparis jam la deziratan sukceson, konigante Esperanton inter la kongresanoj per disdono de broŝuroj diverslingvaj en aŭ pri nia kara organo de komunhoma kompreniĝo.

Nia progresado konstante daŭras en Francujo, kaj ĝi komencas montri sin kontentiga en Belgujo, dank' al la propagando de sinjoro Houzeau de Lehaie. Tre certe niaj sukcesoj estas nek tiel multaj, nek tiel rapidaj kiel esperis kaj revis tro konfidemaj amikoj: sed kiam oni pezas ĝuste la riskojn de tia entrepreno, kiel la nia, oni povas ne sole ĝoji sed eĉ miri pri la rezultatoj ĝis nun akiritaj.

Post la franca revolucio, en 1793, elmigrinto, reveninta el eksterlando

Francujon, estis iam demandata: "Kion vi faris dum tiu terura tempo?" — "Kion mi faris?" respondis li. "mi vivis!" Tia povus esti nia rediro, al tiun kiu miras, ke ni ne sutiĉe vastiĝis en la mondo, dum la 9 jaroj de nia ĝisnuna ekzistado. Jes, ni vivis, kvankam ĉio mankis al ni, kvankam ĉiutage ni devis batali kontraŭ nova malhelpaĵo, kvankam oni ĉiam anoncis nian morton kaj oni eĉ penis rapidigi ĝin. Ni vivis, malgraŭ la malamikoj kaj persekutantoj, malgraŭ la ĵaluzo, la envio, la mokado, la insulto. Ni vivis, kaj ĉiu peno por mortigi nin restis senfrukta. Ĉu tio ĉi ne estas jam io? io bela, io miriga?

Sed ne sole ni vivis — ni kreskis, ni malgraŭ ĉio plifortiĝis konstante, senbalte. Kaj, fakto nekredibla: ni grandiĝis, ni kreskis, ni fortiĝis sen nutro, sen subteno, sen helpo, por tiel diri, sub battoj kaj frapoj. Ĉu tio ĉi ne montras vivecon eksterordinaran kaj tute ne eblan, se Esperanto ne havus en si mem la fortecon de l' vero? Per bruo kaj reklamo dank' al kapitaloj, kiuj mankis al ni, ŝajne oni estus atinginta rezultatojn pli brilajn, sed ĉu vere ili havus la signifon, la valoron de tio ĉi? Multe pli pruvaj estas por ni la nerapidaj sed konstantaj progresoj kun nia malriĉeco, ol estus la plej fulma iro per la mono. Tion ĉi mi certe ne diras el deziro, ke neniam ni riĉiĝu, tute ne; ĉar mi kontraŭe pensas, ke la manko da kapitaloj ligas malfeliĉe la manojn al ni. Sed nia celo estas nur eltiri el la konsideroj esprimitaj pli supre tiun ĉi konsolan ideon: niaj progresoj estas jam grandaj kaj rapidaj, se ni juĝas la rezultatojn kompare kun la malfacileco de la entreprenoj. Ni do ne lasu la kuraĝon fali sed persiste laboru kun duobligita energio, pensante, ke ni jam venke trabatis nin tra la plej danĝera parto de l' vojo. Kaj al tiu kiu riproĉus la ŝajnan malrapidecon de nia marŝo, respondu ni: "La komenca irado de ĉiu granda faritaĵo disvastiganta sin en la mondo estis ion-post-iona. Ĉiu do unu solan indan eltrovon, eĉ en la sfero pure materiala, kiu facile estus akceptita de la homaro. Ĉiu do unu solan meritajn elpenson, kiu ne estus longe mokita kaj forĵetita. Kaj se la homoj tiel agis antaŭ profitoj tre facile videblaj, antaŭ aferoj, kiuj nur postulis ilian akcepton, vi volas ke tuj ili komprenu, ili ŝatu kaj alprenu entuziasme, por tiel diri, iam en si tiel strangan, tiel novan, tiel neviditan, kiel lingvo tutmonda. Ili sin montris idiotaj por aferoj iafaĵe tre simplaj, kaj vi miras, ke ili malbone komprenas nian entreprenon! Sed pripensu pli atente kaj vi konsentos, ke kontraŭe ni devus miri, se tre facile kaj rapidege ili venus al ni, precipe kiam oni ilin trompis per malveraj sistemoj.

— Sed tio ĉi estas tre senesperiga! — Ne, ĉar la pasintaĵo montras, ke fine la grandaj ideoj venkis la malspritecon komunan kaj niaj progresoj donas plenan rajton por esperi.

Sed parolante tie ĉi antaŭ seriozaj amikoj de Esperanto mi ne timis tiel pentri la situacion, kiel mi ĝin vidas. Mi eĉ pensas, ke, ĉiun fojon, kiam ni renkontas personon pretan fariĝi vera propagandisto, ni devas inspiri al li tre fortikan konfidon pri la venko fina, sed ne silenti pri la malfacilaĵoj de la stato nuna. Ĉar alie li povus ricevi malĝustan esperon de tre facila kaj tre rapida triumfo. Sed se konfido subtenas, konfidego faligas. Kredite, ke ni havos senpenan kaj baldaŭan sukceson, ni malkuragiĝas, kiam ĝi atendiĝas sin, kiam ĝi postulas de ni tro fortan batalon. Kontraŭe ni restas firmaj, se ni preparis nin por longa kaj pena milito.

Per ĉiuj fortoj akcelu ni la finan venkon de nia ideo, ni konfidu pri ĝia triumfo, sed ne miru kaj ne timu, se ĝi ne venos tiel rapide kiel ni deziras.

L. de Beaufront.

Granda manko.

Mi kredas, ke ĉiu ĝusta esperantisto, eĉ longe ne pensante, diros: "plej granda manko en nia kara lingvo kaj en nia juna literaturo estas plena foresto de kritiko". Kaj post tre longa pripensado li diros tion saman, ĉar ĝi efektive estas grandega manko.

S-ro Sutkovoĵ, kun kiu mi bedaŭrinde ne estas ankoraŭ konata, en N:o 8 de Lingvo Internacia skribas interalie: "ni esperu, ke la aŭtoroj de verkoj, kiujn (aŭtorojn aŭ verkojn?) ni kritikos, ne sin sentos ofenditaj, ĉar tiu ĉi kritiko estos utila por la tuta afero, kaj antaŭ la utilo de l' afero ne devas ekzisti privataj ofendoj."

Tiu ĉi loko el skribaĵo de estimata s-ro Sutkovoĵ plaĉas kaj ne plaĉas al mi. Ĝi plaĉas al mi per tio, ke en ĝi esprimiĝas tute leĝa persista deziro, ke kritiko ekzistu, — kaj ne plaĉas, ĉar en ĝi esprimiĝas supozo, ke in el verkistoj povas sin ofendi per kritikado de liaj verkoj (aŭ eĉ de aŭtoro mem). Tiu ĉi supozo montras nur, ke s-ro Sutkovoĵ rigardas kritikon tiel same, kiel ankaŭ multegaj aliaj el miaj kunlandanoj, t. e. ke kritiko estas insultado. — Per si mem estas kompreneble, ke tiela kritiko devas ofendi, sed en tia okazo ĝi, kiel ĉia insultado, ne povas esti utila por kritikata, kiel ankaŭ por kritikanta. Kaj, efektive, kiom da utilo ricevos mi, aŭ mia verko, se oni min insultos?

Kun permeso de estimata s-ro Sutkovoĵ, mi rigardas tiun ĉi aferon iom alie. Laŭ mia opinio, kritiko, por mallonge diri, estas vera mezurilo de indoj kaj malindoj de ia verko, homo, agado, afero, aŭ eĉ de ia objekto. Ĝi devas montri ĉiujn rimarkitajn malindojn, mankojn, sed kune ĝi ne havas rajton kaŝi eĉ unu el efektivaj indoj, kiuj iafaje, eble, tute okaze sin trovas eĉ en malbonega homo, en abomena verko k. t. p., kaj, mi pensas, tiela kritiko neniam povas ofendi. — Tial mi volas kredi, ke ni, esperantistoj, ne havas kritikon ne pro timo ofendi iun — sekve oni devas elserĉi iajn aliajn kaŭzojn de tiu ĉi stranga apero. Ni serĉu.

Ha, jen estas unua kaŭzo: "ne sole nia literaturo, sed eĉ nia lingvo mem estas ankoraŭ tiel junaj, ke estas tro frue postuli por ili ekzistadon de kritiko." — Karaj gesinjoroj! Kion vi diras? Ja nia lingvo kaj ĝia literaturo ne estas perfektaj, ni ankoraŭ devas ilin perfektigadi, — kia do rimedo estas por tio ĉi pli bona, ol kritikado? Konstanta kaj plej severa kritikado? Montru ĝin al ni! Vi tion ĉi ne povas fari, sekve juneco de lingvo kaj de ĝia literaturo ne sole ne malhelpas ekzistadon de kritiko, sed tute kontraŭe: eĉ persiste ĝin postulas.

"Sed — oni diros al ni — estas ankoraŭ aliaj kaŭzoj." — Ekzemple? "Ekzemple... ĉiuj, kiuj almenaŭ iom posedas plumon, plivolas verkadi iajn versaĵojn, rakontojn, poemojn, dramojn k. t. p., kaj kritikadi... kritikadi estas tiel enue!"... — Ha, jes! tiu ĉi kaŭzo efektive estas grava, se lingvo internacia Esperanto estus elpensita escepte por amuzado de enuantaj gesinjoroj, avidantaj gloron almenaŭ en mondo esperanta... Sed, bedaŭrinde, granda kreinto de nia kara lingvo, elspezinta preskaŭ tutan vivon sian por ĝia kreado, havis alian celon: ne pensante pri gloro, ne atendente ian rekompencan, li revis nur forigo* de sekvoj de turo Babilona, li volis, ke:

"Sur neŭtrala lingva fundamento,
Kompreneble unu la alian.
La popoloj faru en konsento
Unu grandan rondon familian."


Tiu ĉi celo, kiel vi mem vidas, karaj gesinjoroj, estas iom pli alta, ol amuzo aŭ rimedo kontraŭ enuo; atingi tiun ĉi celon por sola homo ne estas ebla. kaj ni ĉiuj, amikoj-esperantistoj, devas senlace labori, ne pensante nur pri amuzado. — Kiela do devas esti nia laborado? Ni ĉiam devas perfektigadi kaj propagandadi nian karan lingvon. Kia do estas plej grava rimedo por perfektigado de nia lingvo? Konstanta kaj plej severa kritikado. Sekve via tria kaŭzo, miaj estimataj gesinjoroj, ankaŭ estas sensenca *).

Tiamaniere ni forigis jam tri kaŭzojn de foresto de kritiko: timon iun ofendi, junecon de lingvo kaj de ĝia literaturo kaj foreston de kritikistoj. Kiaj do kaŭzoj estas ankoraŭ? Mi ilin ne vidas kaj neniu ilin montras al mi, kaj tial mi sentas min en plena rajto diri:

— Kritiko devas esti! —

5 XI —96. Sedroĵi.

V. Devjatnin.



Novaĵoj.

Oferado kaj propagandado.

— S-ro *A. Zakrĵevski* (Rusujo, Smolensk) decidis eldoni novan propagando-broŝuron, kiu enhavos plenan gramatikon de la lingvo kaj diversajn modelojn de l' esperanta prozo kaj poezio. Sed ĉar al li mankas mono por eldoni ĝin en granda kvanto da ekzempleroj, li sin turnas al la esperantistoj kun la peto helpi al li aŭ abonante certan nombron da ekzempleroj de lia broŝuro, aŭ simple sendante al li ian sunon da mono. La nomoj de la oferintoj estos presitaj en la "Lingvo Internacia". El la smolenskaj esperantistoj al s-ro Zakrĵevski jam oferis por tiu ĉi celo: s-rino *S. Jaceviĉ* — 1 rublon, s-rino *S. Viŝnerska* — 1 rublon, s-roj *Dembski* kaj *M. Podtiagu* — po 50 kop.

— S-rino *Manjkovskaja* (Kremenec, gub. Volinskaja, Rusujo) transsendis al ni 10 rubl., oferitajn de unu nekonata persono. La mono estas dediĉita por la propagando de nia lingvo.

— S-ro *G. J. Ramstedt* (Abo, Finnlando) havis la 11-an de oktobro parolon pri lingvoj tutmondaj, precipe pri Esperanto, en la festsalono de l' sveda liceo, antaŭ cent personoj.

— Por la gazeto ni ricevis 1 rublon de s-ro *Zakrĵevski* el Smolensk.

— S-ro *Soliterman* (Skvira, gub. de Kiev, Rusujo) skribas, ke li oferos por Esperanto 1⁰⁰/₀ el siaj enspezoj kaj ankaŭ ĉiun apartan unukopekan moneron, kiu trafos en liajn manojn.

— Por propagando de nia lingvo ni ricevis de s-ro *N. Spiridonov* (Meensk, Rusujo) 0,50 r.

— Neordinaran rimedon por propagandi nian lingvon uzas s-ro *O. W. Zeidlitz*, kiu sur la dorsa flanko de ĉiuj banknotoj, kiujn li elspezas, skribas la vorton *Esperanto* en grandaj, klare legeblaj literoj. La banknotoj, dum sia vojo el mano en manon, ĉiam senĉese ripetados la vorton pri nia lingvo: tiu ĉi maniero devas esti des pli efektiva, ke la banknoton,* kiel oni scias, ĉiu konservas kun granda zorgemeco, dume la gazeton oni traokulas kaj forĵetas, kaj — forgesas la enhavon.

*) Kio, tamen, ne malhelpas, ke ĝi ekzistu.

Progresado de la lingvo.

— En *Krasnojarsk* fondiĝis antaŭ ne longe malgranda rondeto de esperantistoj. Celo de tiu ĉi rondeto estas: ellerni lingvon internacian Esperanto, laŭeble disvastigi la lingvon, labori kaj interesi sin por ĉiuj esperantistaj aferoj. Ĉiu membro de la rondeto pagas ĉiujare 2 rublojn, 1,50 r. por "L. I." kaj 50 kop. por la biblioteko de l' rondeto. Estas aranĝita ĉe librovendisto *Komarov* vendado de esperantistaj libroj. Ĝis nun la rondeto havis kaj nun havas kvar konstantajn kaj ok okazajn membrojn. Membroj kunvenas du fojojn en monato.

P. Kadik.

— Ni devas noti la energian agadon de la esperantistaro en Smolensk, precipe de s-ro A. Zakrjĵevski. La esperantistoj de Smolensk aranĝas *konstante* privatajn spektaklojn en Esperanto; ili jam prezentis la "Unuan brandfariŝton" kaj dum la kristnasko ili intencas prezenti "Kain'on" de Byron. Dank' al s-roj A. Z. kaj al la librovendisto A. A. *Lapin* oni vendas en Smolensk esperantaj lernolibrojn, vortarojn kaj aliajn librojn. Komencante de novembro de tiu ĉi jaro, s-ro A. Zakrjĵevski, membro efektiva de la societo "Espero" en Peterburg, intencas eldonadi apartajn adresarojn de la smolenskaj esperantistoj. Oni komunikas al ni, ke la propagando de Esperanto iras *tre sukcese* en Smolensk; nia lingvo progresas tie ĉiutage.

Esperanta Preĝejo.

S-ro *Zakrjĵevski* (Rusujo, Smolensk, *Oficerskaja Sloboda*, d. de Erdeli) skribas al ni:

"La 26-an de oktobro nia nova katolika preĝejo, — la plej bela konstruaĵo en nia urbo, — estis sanktigita de la estimata kanoniko, pastro *Stefano Deniseviĉ*, dank' al kies penoj ĝi estas konstruita. En la daŭro de l' Sankta granda Meso, kiun havis la abato de la Smolenska preĝejo, pastro *Hordyeviĉ*, ĥoro de volontuloj kantis tre bele diversajn religiajn kantojn. En la fino de la Sankta Meso tiu ĉi ĥoro ekkantis la kanton *en Esperanto*, verkitan de l' pastro A. *Dombrovski* kaj presitan en la "Preĝaro por katolikoj" ("Laŭdadu Dion, ĉiuj gentoj teraj..."). Tio ĉi estas la unua fojo, ke oni kantis *en Esperanto en preĝejo*.

"La muzikon por tiu ĉi religia kanto verkis nia orgenisto *Francisko Lipĉinski*. En la koro partoprenis la esperantistoj de Smolensk, nome: s-rinoj *Jaceviĉ*, *Višnevskaja*, *Dumanska*, *Janicka*, *Ĉerniacka* kaj aliaj, kaj s-roj *Sobolevski*, *Dembski*, *Zakrjĵevski* k. a."

Kredeble tiu ĉi ekzemplo trovos imitantojn. La belaj sonoj de Esperanto eksonu en la preĝejoj de l' tuta tera globo!

Voko sen revoko.

S-ro O. W. *Zeidlitz* skribas al ni:

"Antaŭ kelkaj monatoj mi faris al amikoj esperantistoj vokon pri la estonta ekspozicio en Stokholm; tiun ĉi vokon oni povas legi en "Lingvo Internacia", aprila numero, paĝo 57. Ĉar ĝis nun al mi venis nenia respondo, mi trovas eĉ tro facila "kunigi en unu tutaĵon" la proponojn, sed mian propran proponon, fondatan sur la sama "tutaĵo", mi devas nun lasi; mi tamen ripetas, ke ion oni devas fari por nia afero en la estonta ekspozicio.

Korpilombolo, Svedujo la 8-an de okt. 1896.

Amike Otto W. *Zeidlitz*."

Jes, oni nepre devas ion fari por nia afero en la ekspozicio de Stokholm, tiel same, kiel oni devis ion fari en la ekspozicioj de Genève, de Ber-

lin. de Nürnberg, de Niĵni-Novgorod, kiel oni devas ion fari en la medicina kongreso de Moskvo, en la estonta ekspozicio de Parizo, k. t. p., k. t. p., sed... niaj amikoj ne amas tre rapidi en similaj aferoj; kvankam la faktoj konstante pruvas, ke nia lingvo ĉiam bone vastiĝas, kiam oni ĝin vastigas, ke la laboro de propagandistoj ne perdiĝos vane. Ĉu efektive ni devas konsili al niaj amikoj, ke ili ne sin turnu al aliaj esperantistoj por ricevi ian konsilon aŭ helpon, kiel sin turnis s-ro Zeidlitz, sed ke ĉiu el ili, kiu deziras esti utila por la afero, laboru tute sola, esperante nenian helpon nek konsilon?

Novaj eldonoj.

— S-ro *Zakrĵevski* skribas al ni:

“Baldaŭ mi eldonos propagandan broŝuron de nia lingvo en alia formo kaj sub alia titolo, ol la ĵus eldonitaj. Mia broŝuro krom ĉio, kion enhavas la nunaj broŝuroj (kun kelkaj ŝanĝoj), enhavos ankaŭ la tutan gramatikon de la lingvo, modelojn de esperanta prozo kaj poezio kaj eltiron el la vortaro, necesan por traduki tiujn ĉi modelojn. En la fino de l' broŝuro mi presos: 1) nomaron de niaj verkoj, 2) anoncojn pri la “Lingvo Internacia” kaj pri la “Biblioteko”. La broŝuron mi eldonos en lingvoj pola kaj rusa.”

* * *

— La odesa esperantistaro entreprenis du gravajn laborojn: la tradukon de l' Biblio en nian lingvon kaj la prilaboron de l' plena vortaro rusa-esperanta. Por tiu ĉi celo la odesaj esperantistoj kunvenas ĉiusemajne (sabate vespere), komune prijuĝas la plej malfacilajn lokojn de la Biblio, kaj komparas la esperantan tradukon (kiun oni faras laŭ la hebrea originalo) kun aliaj tradukoj (angla, franca, germana, rusa); ili priparolas ankaŭ la malfacilajn vortojn de l' rusa vortaro (t. e. la vortojn, kiuj havas kelkajn signifojn), serĉas la konvenajn esperantajn signifojn de tiuj ĉi vortoj, aldonante al ili ankaŭ sufiĉe da frazologia materialo. Por pliprecizigi sian laboron, la odesaj esperantistoj korespondas kun aliurbaj kompetentaj esperantistoj.

* * *

La societo “Espero” komunikas al ni, ke ĝi dissendis senpage po unu ekzemplero de “Kain” al la sekvantaj ĵurnaloj, bibliotekoj kaj societoj:

A) Ĵurnaloj: 1) L'Étranger, 2) Novoje Vremja, 3) Nedjelja, 4) Novosti, 5) Russkaja Misl, 6) Revue de Soc. savants des départements;

B) Bibliotekoj: 1) Publika Imperiestra Biblioteko de S.-Peterburg, 2) Biblioteko nacia de Parizo, 3) Publika de London;

C) Societo: 1) Franca Akademio.

La adreso de la societo “Espero” estas:

Rusujo, S.-Peterburg, Nabereĵnaja r. Karpovki, 20, loĝ. 3. al s-ro N. A. Borovko.

* * *

— S-ro *Zakrĵevski* (*Rusujo, Smolensk, Officerskaja Sloboda*) skribas al ni:

“La 15^a de Septembro, dimanĉe, en mia hejmo estis aranĝita la esperanta spektaklo. Oni prezentis la komedion de L. N. Tolstoj: ‘Unua Brandfaristo’ en Esperanto. Antaŭ la komenco de la spektaklo la ĥoro kantis nian himnon ‘La Espero’.


Apud la enira pordo oni disdonis senpage al ĉiuj miaj gastoj la propagandajn broŝurojn kaj la gramatikon de nia lingvo, ĉar multaj gastoj estis personoj, kiuj ne scias nian lingvon.

En la spektaklo partoprenis la sekvantaj personoj: *A. Zakrĵevski, I. Dembski, Paŝic*, fr-ino *Sofja Jaceniĉ*; fr-ino *Viŝnevskaja* kaj aliaj esperantistoj de nia urbo.”

* * *

Pri Esperanto parolis: La numero 89 de *"Norrtelje Tidning"* enhavas tre longan artikolon pri Esperanto, la nova lingvo internacia. La skribinto, kiu siu nomas "novlernanto", komence elvolvas la ideon de tutmonda lingvo kaj montras, ke Volapük, kvankam havis multajn anojn, tamen ne povis efektiviĝi tiun ĉi ideon. Kontraŭe Esperanto havas multon da kondiĉoj por okupi la lokon de tutmonda lingvo. Poste la skribinto parolas pri la ecoj la plej eminentaj de nia lingvo kaj donas esperantan lecionon, tuŝante en la gramatiko kaj la lerno de la vortformado la plej gravajn lokojn.

La praktikan uzon de Esperanto li montras per tio, ke tiu ĉi lingvo tre estas uzebla kiel turista lingvo, kaj ke ĝi estas parolita kaj en Lapplanduja neĝa montaro kaj apud la bordoj de l' Nigra maro. Li finas la artikolon kun la admono al siaj legantoj konatiĝi kun tiu ĉi lingvo atentinda kaj en ilia loĝeja urbo eble fondi klubeton por la plua disvastigado de Esperanto.



Hinda rakonto

de Eça de Queiroz.

Estis iam unu reĝo, juna kaj kuraĝa, estro en unu regno, plena da urboj kaj fruktoportaj kampoj; li foriris por bataladi en malproksimaj landoj. lasinte solan kaj malkontentan sian reĝinon kaj fileton, kiu ankoraŭ vivadis en sia lulilo, ĉirkaŭvolvita per tolaĵetoj.

Komencis malgrandiĝi la plenkoro, kiu lin vidis marŝi, ravitan de lia sonĝo pri al milito kaj pri gloro, kiam aperis unu el liaj kavaliroj, rompita la bataliloj, nigrita de l' seksango kaj de l' polvo de la vojoj, alportante maldolĉan sciigon; la perdon de unu batalo kaj la morton de l' reĝo, trapikita per sep ponardegoj ĉe l' bordo de unu riverego inter liaj nobeloj la plej elektitaj.

La reĝino ploris estre la reĝon. Ŝi ploris ankaŭ ĉagrene la edzon, kiu estis gaja kaj bela. Sed precipe ŝi ploris turmente la patron, kiu tiel lasis la fileton senhelpan inter tiom da malamikoj de lia malforta vivo kaj de l' regno, kiu devus aparteni al li, sen ia brako por lin defendi, potenca per la forto kaj potenca per la amo.

El tiuj malamikoj la plej timinda estis lia onklo, la frato bastarda de l' reĝo, diboĉa kaj sovaĝa homo, ema al envio malpura, deziranta la regnestriĝon nur pro trezoroj de l' regno; li de kelkaj jaroj loĝadis en unu kastelo sur la montoj, kun bando da ribeluloj, kvazaŭ unu lupo, kiu atendas la kaptajon inter sia anaro. Ve! la kaptajo nun estis tiu infaneto, la mamata reĝo, estro de tiom da provincoj, kiu estis dormanta en sia lulilo, kun ora sonorludilo, premita en la mano!

Flanko ĉe flanko alia infano dormadis en alia lulilo. Sed tiu ĉi estis sklavuleto, ido de l' bela kaj fortika sklavulino, kiu nutradis la princon. Ili ambaŭ naskiĝis dum la sama somera nokto. La sama brusto ilin nutradis. Kiam la reĝino, antaŭ ol ekdormi, iris kisi la princon, kiu havis blondajn kaj maldikajn harojn, ŝi kisis pro la amo ankaŭ la sklavuleton, kiu havis nigrajn kaj krispajn harojn. La okuloj de ambaŭ brilis kiel multekostaj ŝtonoj. Nur la lulilo de unu estis riĉega, el elefanta ostoj kaj punktoj — kaj la lulilo de l' alia estis malriĉa kaj el kanoj. La fidela sklavulino tamen flegadis ilin ambaŭ per egalaj karesoj, ĉar, se unu estis ŝia infano, — la alia estis ŝia reĝo.

Naskita en tiu reĝa domo, ŝi havis la pasion, la religion pri siaj geestroj. Neniajn larmojn oni verŝis pli sentemajn, ol la ŝiaj pro la reĝo, mortigita ĉe l' bordo de l' riverego. Ŝi apartenis tamen al la gento, kiu kredas, ke la

vivo tera daŭras en la ĉielo. La reĝo, ŝia estro, certe jam estas nun reganta alian regnon, trans la nuboj, egale plenan da urboj kaj fruktoportaj kampoj. Lia batala ĉevalo, liaj bataliloj, liaj paĝioj estis suprenirintaj kun li en altaĵojn. Liaj regatoj, kiuj mortus baldaŭ, reprenus ilian regatecon ĉirkaŭ li en tiu ĉiela regno. Kaj ŝi, unu tagon, siavice supreniros per ia luma radio reloĝi la palacon de ŝia estro kaj denove ŝpini la tolon por liaj tunikoj kaj ekbruligi iafoje la vazon de liaj parfumoj; ŝi estos en la ĉielo, kiel ŝi estis sur la tero, kaj estos feliĉa en sia servuto.

Sed ŝi ankaŭ ofte tremis pro sia princeto! Kiom da fojoj, donante al li la mamon, ŝi pensis pri lia malforteco, pri lia longa infaneco, pri la malrapidaj jaroj, kiuj pasus antaŭ ol li estus almenaŭ tiel granda, kiel unu glavo, — kaj pri tiu onklo kruela, kies vizaĝo estas pli malluma ol nokto, kaj kies koro estas pli malluma ol la vizaĝo, kiu envias la tronon kaj spionas de l' supro de sia ŝtonego, inter la glavoj de sia bando! Malfeliĉa princeto! Kun pli granda flego ŝi lin alpremadis tiam inter la brakoj. Sed se ŝia filo balbutis apud ŝi — ŝiaj brakoj etendiĝis al li kun varmamo pli feliĉa. Tiu, en lia malriĉeco, nenion devas timi de l' vivo. Malfeliĉoj, bataloj de l' malbona sorto neniam povus lin restigi pli senigita de l' gloro kaj de l' bienoj de la mondo, ol li jam estis tie, en la lulilo, sub la tola blanka kurteneto, kiu ŝirmadis lian nudajon. La vivo ŝajnas por li vere pli kara kaj konservinda, ol por lia princo, ĉar neniam el la klopodaj zorgoj, per kiuj ĝi nigrigas la animon de l' estroj, atingos lian liberan kaj simplan animon de sklavulo. Kaj, kvazaŭ amante lin pli pro tiu feliĉa humileco, ŝi kovradis lian grasan korpeton per kisoj pezaj kaj varmegaj, — kisoj, kiujn ŝi faradis malpezaj sur la manoj de sia princo.

Dume granda teruro vastiĝis en la palaco, kie nun regnas virino inter virinoj. La bastardulo, la homo enviema, kiu vagadis en la supro de l' montegoj, estis veninta al la ebenaĵo kun sia bando, kaj jam restigis post si, tra domoj kaj vilaĝoj feliĉaj, sulkon da mortigo kaj ruinoj. La pordegoj de l' urbo estis refortikigitaj per ĉenoj pli fortikaj, sur la turoj brilis lumoj pli altaj, sed por la defendo mankis vira disciplino. Ŝpinilo ne governas kiel glavo. La tuta nobelularo fidela pereis en la granda batalo, kaj la malfeliĉa reĝino nur sciis alkuri ĉiumomente ĉe la lulilon de sia fileto kaj plori super li sian malfortecon de vidvino. Nur la fidela nutristino ŝajnis trankvila; kvazaŭ la brakoj, kiuj ame vartadis ŝian princon, estus muregoj de ia fortikaĵo, kiujn neniam kuraĝo povus venki.

Jen en unu nokto, nokto silenta kaj malluma, kiam ŝi estis ekdormonta kaj jam senvestita en ŝia lito, inter la du infanoj, ŝi pli divenis ol sentis mallongan tintadon de fero kaj bruon de batalo, malproksime, ĉe la eniro de la reĝaj fruktokampoj. Envolvinte sin rapide en mantelon, ĵetante malantaŭen siajn harojn, ŝi aŭskultis turmente. Sur la tero, kovrita de sablo, inter la jasmenujoj resonadis ies pezaj kaj malgraciaj paŝoj. Poste eksonis ia ĝemo, ies korpo falis mole sur la ŝtonojn, kiel pakaĵo. Ŝi fortege malfermis la kurtenon... kaj tie, en la fino de l' galerio ekvidis homojn, lumon de lanternoj, brilon de bataliloj... Unumomente ŝi komprenis ĉion — la palacon almititan, la kruelan bastardon, kiu venis por preni, mortigi ŝian princon! Tiam rapidege, sen ia ŝanceliĝo, sen ia dubo ŝi forprenis la princon el la elefantosta lulilo, ĵetis lin sur la malriĉan kanan lulilon kaj, preninte sian filon el la simpla lulilo, kun senesperaj kisoj lin kuŝigis en la reĝan lulilon, kiun ŝi kovris per punktoj.

Subite ia grandega homo, la vangoj flamantaj, portanta *bigran mantelon* sur sia armaĵo, aperis ĉe l' pordo de la ĉambro, inter aliaj homoj, kiuj altigadis lanternojn. Li ĉirkaŭrigardis, alkuris al la elefantosta lulilo, kie briladis la punktoj, fortiris la infanon, kiel oni fortiras saketon, plenan da oro, kaj, sufokante liajn kriojn sub la mantelo, foriris furioze.

La princo dormis en sia nova lulilo. La nutristino restis senmova en silento kaj mallumo.

Sed subite trazonis krioj en la palaco. Post la vitroj pasis la longa flamo de l' torĉoj. La kortoj resonis pro la frapado de l' bataliloj. Kaj, la haroj malordigitaj, preskaŭ nuda, la reĝino eniris ĉu la ĉambron inter siaj korteganinoj krivokante sian filon. Ekvidinte la elefantostan lulilon, la tolaĵojn malordigitajn, malplenan, ŝi falis sur la plankon, plorante en malespero. Tiam, silenta, tre malrapide, tre pala, la nutristino malkovris la malriĉan lulilon el kanoj... La princo tie sin trovis kvietita, dormanta, en sonĝo, kiu ridetigadis lin kaj iluminadis lian tutan vizaĝon, ĉirkaŭitan de l' oraj haroj. La patrino falis sur la lulilon kun sopiro, kiel falas mortinta korpo.

Kaj en tiu momento alia bruo skuis la marmoran galerion. Ĝi estis la kapitano de l' gvardio kun sia fidela anaro. En iliaj krioj oni sentis tamen pli da malĝojo, ol da triumfo. La bastardo estis mortigita! Kaptita, kiam li forkuris, inter la palaco kaj la fortikaĵo, frakasita de l' forta legio da soldatoj, li pereis kun dudek de lia bando. Lia korpo tie restis, trapikita per sagoj, en la flanko, sur grandamaso da sango. Sed tie! Sennoma doloro! La korpeto mola de la princo tie ankaŭ restis, envolvita en la mantelon, jam malvarma, ruĝe nigra ankoraŭ dank' al manoj kruelaj, kiuj mortige premis lian gorĝon!... Tiel, tumulte, la militistoj ĵetadis la kruelan sciigon, kiam la reĝino, kvazaŭ freneza, jen plorante, jen ridante, altigis sur la brankoj, por montri al ili, la princon vekigintan.

Ĝi estis mirindaĵo, estis varmega saluto. Kiu lin savis? Kiu...? Tie staris muta kaj rigida apud la malplena elefantosta lulilo tiu, kiu lin savis! Servantino eksterordinare fidela! Estis ŝi, kiu por konservi la vivon al sia princo sendis sian filon al morto... Tiam, nur tiam la feliĉa patrino, elirante el sia ĝojo, ĉirkaŭprenis pasie la doloran patrinon kaj kisis ŝin, nomante ŝin fratino el sia koro... Kaj el tiu popolamaso, kiu sin premadis en la galerio, eliris nova varmega saluto kun petegoj, ke oni rekompencu kiel eble plej malavare la mirindan servantinon, kiu savis la reĝon kaj la regnon.

Sed kiel? Kiom da oro povas pagi unu filon? Tiam unu maljunulo el nobela gento opiniis, ke ŝi estu kondukata en la reĝan trezorejon kaj elektu inter tiuj riĉaĵoj, kiuj estis la plej grandaj en tuta la Hindujo, ĉiujn, kiujn ŝi povus deziri...

La reĝino prenis la manon de l' servantino, kaj, ne forlasante la rigidecon de sia marmora vizaĝo, marŝanta kiel mortinto, kvazaŭ en sonĝo, ŝi estis tiel kondukata al la ĉambro de la trezoroj. Estroj, korteganinoj, militistoj sekvis ilin kun la respekto tiel sincera, ke oni apenaŭ povis aŭdi la bruon de l' ŝuoj sur la glatŝtonoj. La dika pordo de l' trezorejo malfermiĝis malrapide. Kaj kiam unu servanto foriĝis la barojn de la fenestroj, la antaŭmatena lumo, jam hela kaj rozkolora, eniranta tra la kradoj el fero, ekbruligis miregindan kaj fajrantan bruliĝon el oro kaj multekostaj ŝtonoj. De la ŝtona planko ĝis la mallumaj arkaĵoj, en la tuta ĉambro relumadis, brilegadis la bataliloj ornamitaj, la amasoj da diamantoj, la multego da oraj moneroj, la longaj fadenoj el perloj, — ĉiuj riĉaĵoj de tiu regno, amasitaj de cent reĝoj dum dudek cent


jaroj. Unu longa *ha!* malrapida kaj mireganta, pasis inter la popolamaso, kiu mutiĝis. Poste estis scivolega silento. Kaj en la mezo de l' ĉambro, envolvita de l' multekosta brilego, staris senmove la nutristino... Nur ŝiaj okuloj, brilantaj kaj sekaj, sin turnis al la ĉielo, kiu trans la kradoj fariĝis rozkolora kaj ora. Tie, en tiu ĉielo, freŝa pro l' antaŭmateno, sin trovadis nun ŝia infano. Tie li estis, kaj jam la suno iris supren, kaj estis malfrue, kaj ŝia infano ploris, serĉante ŝian mamon!... Tiam la nutristino ridetis kaj etendis la manon. Ĉiuj sekvis, ne spirante, tiun malrapidan movadon de ŝia malfermita mano. Kian miregindan juvelon, fadenon el diamantoj, manplenon da rubenoj estas ŝi elektonta?

La nutristino etendis la manon — kaj sur unu banko ĉe flanko, inter amaso da bataliloj, ŝi prenis ponardon. Estis ponardo de unu maljuna reĝo. tute ornamita per smeraldoj, kiu povus pagi unu provincon.

Ŝi prenis la ponardon kaj ĝin premante forte en la mano, celante al ĉielo, kie aperis la unuaj radioj de l' suno, ekrigardis la reĝinon, la popolamason kaj ekkriis:

— Mi savis mian princon, kaj nun — mi iras doni la mamon al mia filo!
Kaj ŝi trapikis per la ponardo sian koron...

Tradukis **Costa e Almeida.**




Milito.

L' enua paco, trankvileco rusta
Rompigis nun kaj estas fine for;
Flamigis fajro en la homa brusto
Kaj venas tago de brilanta glori'.
Kaj ĉu ni buĉas turkon la sovaĝan,
Ĉu la turbana turko pelas nin, —
Egale: iu montras la kuraĝon.
Estantan homa virto al la fin'.
La mortigitoj naskas la kompaton
Maloftan, tre maloftan inter ni.
Kaj kiu nomos tiun senton fratan
Ne bono de ĉielo kaj de Di'?
Vunditoj ĝemas, mortas kaj infektas,
Sed tio ĉi ne estas malbonaĵ':
Des pli la medicino sin perfektas,
Kaj tio ĉi ne estas malgravaĵ',
Por pli spioni en la fremda lando,
Por havi ĉian specon de sciiĝ'
Ni lernas lingvojn, tio estos granda
Progreso en la internaciig'.
Dank' al sieĝoj, danke al kaptitoj,
Eĉ dank' al propra enkaptigo, ni
Pri la nacioj estas instruitaj,
Ĉu ne scienco estas tio ĉi?

Al la venkintoj venas novaj teroj.
Riĉecoj, ĉia sekvo de sukces';
Ĉu estas multiplaj efektivaj peroj
Por iri rapidege al progres'?
Venkitaj plibonigas la armeon
Por malamikojn pagi kun procent';
Ĉu al rabistoj porti la pereon
Ne estas singardemo kaj prudent'?
Ne unu urbo tre malodoranta
Percas kaj — kovriĝas per la glori':
La malodoro pli ne ekzistanta
Certege pli ne estas malodor'.
Skulptarto, pentroarto, poezio
Ekfloras: ilin vokas la misi'
La kuraĝulojn glori kun pasio.
Kaj ĉu la artoj venas ne de Di'?
Kaj sekve glori al militoj!
Fruktoportema estas sanga mar'.
Je ĉiam feliĉiĝos la paŝistoj,
Glorataj de la vivrestinta ar'.
Salutu do kaj glori la armeon!
Se ĝin en teron tiros ĝia glori',
Ni trinkos vinon, kantos la pereon
Kaj ĝin honoros per malsobra plori'.

Amiko.



Skizoj gramatikaj.

3. La vortformado en la lingvo Esperanto*).

Oni diras, ke la vortformado kaj la gramatiko de la lingvo Esperanto estas tute arbitra, ke ĉiuj sufiksoj kaj prefiksoj de tiu-ĉi lingvo estas elpensitaj kaj ne eltiritaj el la vivaj lingvoj ("Linguist" N:o 4). Mi ne povas konsenti je tia opinio. Kontraŭe, preskaŭ ĉiuj sufiksoj kaj prefiksoj de Esperanto estas prenitaj el la ĉefaj lingvoj de Eŭropo. Ni komencu per la gramatiko. La finiĝo *i* en la infinitivo estas abreviaturo de *ire, ir, iven*; ekz. *ĝoji*, it. gioire, *dormi*, dormire; *ekzisti*, germ. existiren; *formi*, formiren k. t. p. La finiĝo *ant* estas eltirita el la franca lingvo; *venanta*, fr. venant; *estanta*, fr. étant. — *ata* kun la signifo de l' participo de l' estanta tempo en pasivo = it. *ato*: ekz. *pagata, trovata, kreata, edukata* = it. pagato, trovato, creato, educato; *ita* = ito: *vestita* = it. *vestito*. La finiĝo *o* en substantivoj ekzistas en itala lingvo, *e* en adverboj — en latina kaj ankaŭ en itala; eĉ *a* de l' adjektivoj havas analogion en la svedaj adjektivoj, ekz. *svenska språket*, la sveda lingvo; *denna goda menniska*, tiu ĉi bona homo: *konungens lyckliga regering*, la feliĉa regado de l' reĝo (aliaj similaĵoj je la sveda lingvo: *jen — jen, än — än; kiu ajn*, hvilken *än*, hvein *än*, en germana irgend *ein*). Nur *as, is, os, us, u* estas ĝis certa grado arbitraj (cetero *is* en fr. *je finis*, mi finis; *u* en imperativo ekzistas sole en hebrea kaj araba lingvoj: hebr. *šim'u*, arab. *ismi'u* = aŭskultu); *u* en akuzativo ekzistas en la germana lingvo (den. guten, ihn) kaj en la greka: *domon* = δόμων; *oj* en multnombro ekzistas ankaŭ en la greka lingvo; ekz. *domoj*, δόμοι (aliaj similaĵoj je la greka lingvo: kaj. *nu, plej, aliktor. pri. regi*); *ol* en komparativo = pola *od* (kiel *al* = ad, *el* = e, ex. kaj italaj del, dal, col, nel, pel, sul). *obla* en *duobla, triobla* estas formita laŭ la fr. *double*, hisp. *doble*, angl. *double* (leg. döbl); *duope* memorigas germ. *doppel-*, it. *doppio*; *ono* en *triono, krarono* komparu kun fr. *quarteron*, it. *quarterone*.

Aliaj sufiksoj kaj prefiksoj:

mal — komparu *malsana*, it. malsano; *malkontenta*, it. malcontento; *malhonesta*, fr. malhonnête; *malklera*, fr. maléclairé k. t. p.

in (ino — sekso virina): *regino*, it. regina; *heroino*, it. eroina; *carino*, Zarin, tsarine; *artistino, doktorino, grafino*. Artistin. Doctorin. Grafin; *hundino*, Hündin. En rusa lingvo *-inja*: *grafinja, grafino, knjaginja, princino, geroinja, heroino*.

il (ilo, ia farilo, plenumilo) sin rekontas en antikva germana lingvo kaj en rusa: ekz. *zugil*, kondukilo; *slegil*, frapilo; *hevil*, levilo; *drasil*, draŝilo; *flugil*, flugilo; *sluzzil*, ŝlosilo. En la rusa lingvo: *svetilo*, lumigilo; *kormilo*, direktilo; *kadilo*, fumilo; *udilo*, haltigilo; *kropilo*, ŝprucilo; *merilo*, mezurilo; *ĉernilo*, nigriilo; *belilo*, blankilo, *mazilo*, ŝmirilo; *ĵivilo*, vivigilo (vipo, skurĝo); *vetrilo*, velo, ventilo; *motovilo*, volvilo.

ad (ado, daŭrado): *promenado*, fr. promenade; *paŝado*, fr. canonnade, fusillade; *bastonado*, fr. bastonnade; *blokado*, germ. Blockade.

aĵ (aĵo, faritaĵo, produktaĵo): *trinkaĵo*, fr. breuvage; *plumaĵo*, fr. plumage; *pakaĵo*, io pakita, fr. bagage. *aĵo* = lat. aticum.

an (ano, urbano, landano, partiano) — en multaj lingvoj; ekz. mahometano, kristano, luterano, spartano, romano, veneciano, amerikano, arikano, korsikano. En la rusa lingvo *anec, anin, ane*.

ar (aro, kolekto) = lat. arium; *herbaro*, herbarium; *akvaro*, aquarium; *armaro*, armarium; *vortaro*, vocabularium, it. dizionario, rus. slovar.

*) Ni volas memori, ke por ĉiuj artikoloj subsignitaj de ia aŭtoro respondas la aŭtoro mem. Ankaŭ se ni ne ĉiam aprobas kion li skribas, ni kompreneble ne povas fari ŝanĝon en lia artikolo, kiu estas lia arpartenaĵo. La red.

ĉjo, njo — el rusa lingvo: *Miĉjo*, rusa Miŝa; *Aleĉjo*, rusa Aljoŝa; *Manjo*, *Sonjo*, *Klanjo* — rus. Manja, Sonja, Klanja. (ŝ estas ŝanĝita en ĉ. kiel ordinare).

abl (io farebla, plenumebla) = ibilis, abilis, fr. *able*, it. *evole*, angl. *able* (legu *abl* kiel en Esperanto); *preferebla*, angl. preferable (*abl*); *portebla*, angl. portable; *penetrebla*, angl. penetrable; *pardonebla*, angl. pardonable; *komparebla*, angl. comparable.

ec (eco, ia propreco); it. *ezza*, fr. *esse*, lat. *itia*: *beleco*, bellezza; *grandeco*, grandezza; *gajeco*, gajezza; *dolĉeco*, dolcezza, *alteco*, altezza; *klareco*, chiarezza k. t. p.

edzo, edz-ino, it. *essa* — baronessa, contessa, duchessa. Tiuj ĉi vortoj (edzo, edz-ino) memorigas ankaŭ ital. *esso*, *essa* (li, ŝi).

eg (ego, io grandega). — en la rusa lingvo *jaga*, pola *enga*: ekz. *ŝtormjaga*, ventego en la maro; *deornjaga*, granda korta hundo; *korjaga*, granda faligita arbo; *koljaga*, granda stango; *ŝotjaga*, plena, granda cento; *korĉaga*, granda argila vazo, kruĉego; *miljaga*, mia karega; *molodĉaga*, homo bravega.

ej (ejo, ia restojo aŭ tenejo) el *erjo* (egalsona al greka *ειον* en la nomoj de diversaj lokoj, ekz. *βιβλιοπωλείον*, librovendejo); fr. *erie*, it. *eria*, germ. *erci*: *buĉejo*, boucherie; *ĉemizejo*, chemiserie; *drogejo*, droguerie; *fruktejo*, fruiterie; *lakejo*, laiterie; *librejo*, librairie; germ. Buchdrucherei, Bäckerei (bakejo), Brauerei.

ek el lat. *ex* — punkto de l' eliro, de tie komencas la farado: *ek-krii*, écrier.

em (ema, al io inklinema); komparu fr. *aimer*; *sciema* (sci-ama), *profitema* (ama), *tumult-ema* (ama), *sang-ema* (ama).

ero (unu ekzemplero, unuo, la partoj nedivideblaj, el kiuj konsistas la objektoj — *εξ αμφο*) havas kelkan analogion en la vortoj: *légionnaire*, unu el legiono, *pensionnaire*, unu el pensiono; *exemplaire*, unu peco, ekzemplero. Ekz. *mon-ero*, unu peco da mono, fr. le numéraire, espèces sonnantes; *sabl-ero*, *polv-ero*, *neg-ero*, unu grajno da sablo, polvo nego; *glaciero*, unu peco da glacio.

estro memorigas it. *maestro*, fr. *maitre* (maistre), germ. *Meister*, sv. *mästare*. Ekz. *ceremoni-estro*, Ceremonienmeister, sv. ceremoni-mästare; *kapel-estro*, it. maestro di capella, sv. kapell-mästare. La formo *mestro* ne estus oportuna por la kunmetitaj vortoj, — komparu *regiment-estro* kaj *regimentmestro*.

et: *libreto*, it. libretto; *opereto*, it. operetta; *ĉambreto*, fr. chambrette; *forketo*, fr. fourchette, it. forchetta; *peceto*, it. pezzetto. Ankaŭ en adjektivoj: *blanketa*, it. bianchetto; *nigreta*, it. negretto.

ge kun kolektiva signifo el la germ. lingvo: *gefratoj*, Gebrüder, Geschwister.

id — greka sufikso: *Kronido*, *Atrido*, *Heraklido*.

ig kaj **ig** estas variantoj de unu sama sufikso kaj respondas al *ειω*, *iser*, *isiren*, *izzare*, *eggiare* — isofoje *igare*; *igi* = io fariĝi; ekz. *elektrigi*, s'électriser; *kristaligi*, se cristalliser; *egaligi* (egaliĝi), égaliser. Komp. *verdiĝi*, it. verdeggiare; *blankiĝi*, biancheggiare; *flamiĝi*, fiammeggiare; *lumiĝi*, lumeggiare. Lat. *mitigare*, kvietigi; *fumigare*, fumigi; *variegare*, multkolorigi; germ. *nötigen*, devigi; *würdigen*, honorigi; *befriedigen*, kontentigi.

inda, lat. *-endus*: *kredinda*, credendus, dignus ut credatur; *vidinda*, videndus; *leginda*, legendus; *ridinda*, ridendus; *sciinda*, sciendus; *preferinda*, preferendus (kun la vokalo de l' infinitivo).

-ing — ofte en germanaj lingvoj, sed ordinare en aliaj signifoj (*schilling*, angl. sterling, *stocking*, ŝtrumpo, komp. en Esperanto — tibiingo). El greka lingvo: *σύνγξις*, *γγος*, ĉio havanta la formon de l' tubo, aksingo de l' rado. Iliado 19:387 — en senco de l' ingo por la ĵetilo. Aliaj vortoj; *φάρυγγξ*, *γγος*, faringo; *λάρυγγξ*, *γγος*, laringo (ankaŭ io tuboforma, malplena en interno).

ist (isto, ia specialisto) — en multaj lingvoj: *artista*, *lingvisto*, *juristo*, *ĵurnalisto*, *telegrafisto*, *velocipedisto*.

via mosto el pola *wasza mosc.*

uj (*ujo*, ia konservujo) el itala *ojo* (orium, fr. oir) kun *o* fermita, proksima al *u*: *konservujo*, it. serbatojo, konservatojo; *lavujo*, it. lavatojo; *mangujo*, it. mangiatoja. En la nomoj de l' arboj = fr. ier: *pomujo*, (pomarbo), pommier.

ul en la nomoj de l' personoj laŭ iliaj ecoj — estas analogia al lat. *ulus* kaj rusa *ula*. Ekz. *bibulus*, trinkulo; *credulus*, fr. credule, kredulo, kredemulo; *garrulus*, babilulo; *tremulus*, tremulo. En rusa lingvo; *gorodula*, babilulo; *borodula*, barbulo; *sipula*, muĝulo; *rogula*, kornulo; *krivula*, kurbulo; *hapula*, kaptulo.

um ofte en itala lingvo: verdume, vecchiume, costume, fr. amertume, lat. volumen, acumen. En Esperanto tiu ĉi sufikso havas sekvantajn signifojn:

1) *umo* en la nomoj de l' objektoj, kiuj troviĝas sur la diversaj partoj de l' korpo: kolumo, manumo, nazumo, buŝumo, kalkanumo.


2) *umi*, fari ion per io: aerumi (fari per aero), ventumi (per vento), butonumi (per butonoj), palpebrumi (per palpebroj), lotumi (per loto), krucumi (per kruco), malvarmumi (per malvarmo).

3) *um* en metafora aŭ abstrakta signifo: *plenumi* — abstrakte, sed *plenigi* — konkrete; *brulumi* (flamiĝi) — metafore, *bruli* — en rekta senco; *proksimume* — metafore, *proksime* — en rekta senco. *Laktumo* en la fiŝoj — metafora signifo de l' vorto *lakto*.

V. Laskin.

Roslavl, Smoleusk. gubernio.

Rusujo.



La ortografo de la propraj nomoj.

Respondo al la demando n:o 1 de Aŭg.

Laŭ mia opinio, oni devas skribi en Esperanto la nomojn proprajn laŭ la ortografo de la lando al kiu ili apartenas. Ŝajne la ortografo absolute fonetika estas tre plaĉa ideo, ĉar ĝi estis jam uzita de multaj personoj; sed mi esperas, ke ekzameno pli atenta de la demando konvinkos ĉiujn, ke estas tute neeble akcepti tiun ortografon kiel senesceptan regulon uzotan eĉ por la propraj nomoj. Mi apogos mian diron per du kaŭzoj precipaj kaj per ekzemploj eltiritaj el la praktiko.

1:e Kiel oni povos scii tiun fonetikan ortografon?

En miaj legoj, mi rekontis multajn nomojn de aŭtoroj, lokoj, k. a. diverslandaj kaj diverslingvaj; mi skribas ilin kiel mi ĉiam vidis ilin skribitajn de ĉiuj, nome laŭ la ortografo de la lando, al kiu ili apartenas kaj devas ilian konitecon. Jen, mi fariĝas esperantisto: kaj oni diras al mi, ke laŭ la regulo esperanta mi devos skribi ĉiujn tiujn nomojn fonetike. Kiu konigos al mi tiun fonetikan ortografon? Mi ellernis Esperanton por ŝpari la tempon kaj laboron, kiujn necesigas la ellernado de la fremdaj lingvoj; kaj nune, por esti kapabla skribi la proprajn nomojn, mi devos ellerni la parton la plej malfacilan de ĉiuj lingvoj: iliaj reguloj de elparolo! Ĉar, se mi ne konas ĝin, kiel vi volos ke mi sciu skribi: Leipzig, Goldsmith, New-York, Grieg, Monte-Faccio, Albuquerque, k. a.?

La plej ofte uzatajn mi eble konos post kelke da tempo, kiam mi estos renkontinta ilin skribitajn de persono kompetenta. Sed pri la tre granda

plimulto mi restos ĉiam en dubo, ne scianta kiel mi devas ilin skribi. La nomoj *komunaj* povas esti regule ellernataj, ĉar oni scias, kiajn oni plejmulte bezonas: oni ellernas la "uzajn vortojn". Sed kiel mi povas antaŭdiveni la proprajn nomojn, kiujn la cirkonstancoj ĵigos min uzi? Ilia nombro estas senlima. Novaj rilatoj konigas min ĉiutage pri novaj nomoj de personoj, de lokoj: baldaŭ nomoj, kies nenian ideon mi antaŭe havis, fariĝas vortoj amikaj, kiujn mi ofte bezonas skribi: kaj ĝis kiam okazo estos koniginta al mi ilian bonan ortografon fonetikan, mi estos kondamnita aŭ forlasi la fonetikan regulon kiel nepraktikeblan, aŭ fari nescie terurajn barbarismojn.

Konkludo de tio ĉi: la ortografo fonetika estas neuzebla, ĉar ekzistas nenia regula rimedo por koni ĝin.

2:e Kiajn literojn ni uzos por skribi la nomojn laŭ la fonetika ortografo?

Eĉ supozante ke tiu ortografo povus esti konata, ni efektive estos haltigitaj per baro netransirebla: la absoluta nesufiĉo de la alfabeto. La lingvo Esperanto havas alfabeton pli bonan ol ĉiuj aliaj, pli bone elektitan, pli facile lerneblan kaj uzeblan: sed ĝi ne povas enhavi la literojn necesajn por skribi ĉiujn sonojn de ĉiuj lingvoj; pli ol cento da literoj ne sufiĉus por tio! Sed tiam, kiel vi volas ke mi skribu fonetike la proprajn nomojn? Kiel vi povas demandi, ke tia ortografo estu akceptata kiel komuna regulo en lingvo, kiu ne donas la rimedojn por uzi ĝin?

Konkludo de tio ĉi: la ortografo fonetika estas neuzebla, ĉar la nesufiĉo de la alfabeto malpermesas ĝin absolute.

Tiujn du konkludojn mi plifirmigos per ekzemploj eltiritaj el la artikolo "Analogioj", presita en la "Esperantisto" (15:a Feb:o 1895) kaj subskribita de s-ro N. Borovko. Mi renkontas en tiu artikolo multajn proprajn nomojn; mi nenion diros pri la fizionomio tute stranga kaj maleleganta, kiun tiuj nomoj prezentas al la franca leganto; ni forlasos tiun flankon, malpli gravan, de la demando, kaj ni ekzamenos sole, ĉu la aŭtoro sukcese venkis la du grandajn malfacilaĵojn kiujn mi supre rimarkis.

La unua nomo propra kiun mi rekontas estas "Mongolfje"; kaj de tiu ĉi unua vorto, s-ro B. trovas antaŭ li unu el la plej grandaj malfacilaĵoj de la lingvo franca: la nazaj sonoj. "On, in, en, un" estas elparolataj france tute alie ol esperante. Kaj ĉiu franca vorto en kiu troviĝas unu el tiuj sonoj estas nescribebla laŭ la fonetika ortografo. Sekve "Mongolfje" estas simple barbarismo fonetika, tute kiel "Arland, Mory", kiujn mi vidas poste, — tute kiel estus "Bofron", se iam venus en la spirito de niaj amikoj la ideo ortografi "fonetike" la nomon de nia franca majstro. Kion mi diris pri la nazaj sonoj, tion mi povas ankaŭ diri pri alia sono tre ofta en la lingvo franca: tiu de la litero "e" neakcentita, kiu, en la interno de vorto, sufiĉas por nebligigi la ortografon fonetikan: ekzemple, mia propra nomo, "Lemaire", estas tiel same nescribebla kiel tiu de s-ro de Beaufront; kaj sekve la fonetikanoj devos al ni ambaŭ rifuzi por ĉiam la honorojn de ilia plumo.*

La unua vorto renkontita kaj la analogiaj donis al mi la pruvon, ke mia dua konkludo, — nesufiĉo de la alfabeto, — estas absolute vera. La dua


* Mi kontentiĝis per la sola ekzameno de la nomoj francaj, kiuj perfekte sufiĉis por la pruvo kiun mi volis fari. Sed nature la samajn konkludojn mi atingus ekzamenante la alialingvaj nomojn: pri la anglaj "th", la germanaj "ch", la hispanaj "j, c, z", k. a. oni farus tute analogiajn rimarkojn kiuj plifortigus ankaŭ mian tezon.

vorto, kiun mi rekontas, "Versal", pruvas ke mia unua konkludo ne estas malpli vera. La nomo de urbo "Versailles" estas unu el la maloftaj vortoj francaj, kiuj povas esti tre facile skribataj laŭ la fonetika ortografo: "Versaj" donas tre fidele la manieron per kiu ni france elparolas tiun nomon. Kial s-ro B. ne tiel ĝin skribis? Ŝajne ĉar li ne sciis, ke ĝi devas esti tiel skribata. Tiu ekzemplo montras, ke estas tro efektiva la danĝero, kiun mi anoncis en la unua parto de mia artikolo: kaj mi povas aldiri, sen timo de trograndigo, ke, per plumo malpli lerta ol tiu de s-ro Borovko, la nesciado de la elparolo estus fonto de barbarismoj almenaŭ tiel produktema kiel la nesufiĉo de la alfabeto.

Mi havis: mi pensas ke tio kion mi diris sufiĉas por pravi, ke la ideo de fonetika ortografo universala, ĉiuvorta, estas eble bela revo, sed simpla revo, aŭ, por pli bone diri, danĝera utopio. Ni konservu do por la propraj nomoj la ortografon kiu estas uzata en la patrujo de ĉiu. Tio ne malhelpos nin skribi poste, inter krampoj, la ortografon plej proksimume fonetikan, ĉiafoje kiam ni pensus utile sciigi niajn korespondanton pri la plej bona maniero elparoli la vorton uzatan de ni: sed tio havos sole la valoron de simpla montra rimarko, pli aŭ malpli konforma, sed ne la aŭtoritato de ortografo prezentata kiel regulo.

Cetere mi devas fine rimarkigi ke la propraj nomoj tre ofte uzataj kaj konataj havos preskaŭ ĉiam formon specialan tute esperantan: ekz. Londono, Parizo, Homero, k. a. sed tiu demando pri la "esperantigo" de la propraj nomoj estas tro grava, pro la danĝeroj kiujn ĝi prezentas kaj ankaŭ pro la prudenteco kiun ĝi postulas, por ke mi priskribu ĝin en kelkaj linioj: mi preferas atendi alian okazon por paroli pri tio ĉi pli detale.

René Lemaire.



Pri la libro por komenca legado.

Ĉiuj, kiuj ellernas nian lingvon, lernas ĝin per "Ekzercaro" (N:o 72) kaj poste senpere komencas legi diversajn librojn, skribitajn en la lingvo internacia. Tio ĉi estas entute tre malfacila kaj neoportuna por la lernantoj, ĉar ĉiuj niaj esperantistaj libroj estas skribitaj ne por la homoj, kiuj komencas lerni, sed por tiuj, kiuj posedas jam iom la lingvon. Pro tiu ĉi cirkonstanco kelkaj malpli paciencaj lernantoj, provinte legi en Esperanto kaj renkontinte multon da malfacilaĵoj, perdas la kuraĝon kaj forlasas sian lernadon. Tio ĉi estas, kompreneble, tre maldezirinda por ni. Ni devas fari, ke la lernado de nia lingvo estu eble plej facila kaj agrabla sur ĉiuj ŝtupoj kaj ke la transiro de l' Ekzercaro al la legado de esperantistaj libroj estu plej eble nerimarkebla. Tion ĉi ni povas atingi nur havante apartan libron, kiu enhavos la materialon, kolektitan kaj prilaboritan speciale por la komenca lerna legado.

Estinte vilaĝa instruisto mi en daŭro de kelkaj jaroj diligente kolektadis materialon por verki libron por la komenca legado en lernejoj kaj nun mi havas multe da tiu ĉi materialo: fabloj, anekdotoj, rakontetoj kaj aliaj malgrandaj produktaĵoj de diversaj literaturoj, tre simplaj laŭ la formo, sed tre profundaj laŭ la penso. Mi opinias, ke elektinte el tiu ĉi materialo ĉion plej bonan, mi povus kunmeti la bezonan libron por la komenca legado. La materialo tamen bezonas esti bone prilaborita kaj tiu ĉi prilaborado ne povas esti farita de unu homo, tiom pli de homo tiel ordinara, kiel mi min sentas.

La libro devas esti verkita plej eble perfekte, ne devas porti en si la post-signojn de ia lingvo nacia, devas esti egale komprenebla por ĉiuj nacioj, — entute ĝi devas esti verkita en la stilo eble plej perfekta kaj internacia. Tial mi proponas al ĉiuj niaj amikoj, literature laborantaj por nia afero, labori kun mi en la verkado de la libro. Ĉiujn, kiuj deziros kunlabori, mi petas komuniki al mi pri tio kaj sendi siajn adresojn, kaj ni laboros tiel: ĉion, kion mi elektos el nia materialo, mi sendos al miaj kunlaborantoj por trarigardi kaj korekti, skribante la korektaĵojn super la linioj de mia skribaĵo. Kiam la kajero ĉirkaŭiris al ĉiuj miaj kunlaborantoj kaj revenos al mi, mi sendos ĝin al s-ro Zamenhof, por ke li donu la finan redakcion al nia komuna laboro kaj poste ni povos eldoni la libron, estante konvinkitaj, ke ĝi bone plenumos sian rolon. Tiamaniere ni povos verki la libron de 2—3 presaj folioj kun 100—150 malgrandaj rakontetoj kaj eldoni ĝin en apartaj broŝuroj po 1 presa folio.

Al mi ŝajnas, ke la malgrandeco de l' rakontetoj elektotaj por' tiu ĉi libro havas tre grandan signifon, ĉar granda rakonto lacigas la nekutimintan leganton. Entute la libro, pri kiu mi parolas, devas posedi la sekvantajn ecojn:


- 1) interesan enhavon;
- 2) perfektan kaj simplan stilon;
- 3) egalan kompreneblecon por homo de ĉiu nacio.

Mi pensas, ke tiu ĉi libro, ne postulanta grandajn elspezojn, donus grandegan utilon al nia lingvo, kaj ke multaj, kiuj nun forlasas la ellernadon de la lingvo, tiam ellernus ĝin perfekte kaj ne estus por ni perditaj.

Mi tre petas niajn amikojn pripensi tiun ĉi mian proponon, kaj, se ili deziros partopreni en la verkado, skribi al mi laŭ la adreso:

Rusujo, Orŝa (gub. de Mogilev), Kancelarija lesniĉaho.

M. S. Rakitski.



El Heine.

I.

Per viaj violaj okuloj
Karese rigardas vi min.
Kaj sento revena min prenas.
Kaj mi silentiĝas, fraŭlin'.

Mi pensas pri viaj okuloj
De blua-viola kolor',
Kaj maro da pensoj bluegaj.
Ondiĝas en mi en la kor'.

II.


"Diru, kie estas via
Amo de vi dolĉ-kantita.
Kiam vi de flamo estis
Tra l' animo trapikita?" —

"Ha! la flamoj estingiĝis,
Estas for l' anim-ornamo.
Kaj la kantoj estas urno
Kun cindraĵo de la amo."

III.

Mi volas promeni en verda arbar',
Odoras floretoj kaj kantas birdar',
Ĉar mia okulo kaj mia orelo
Post morto troviĝos en tombo malhela.
La floroj ne metos odoron al mi
Kaj pli ne bonsonos la bird-melodi'.

A. Kofman.



El "Versaĵoj en prozo" de I. S. Turgenev.

La pasero.

Mi estis revenanta el ĉaso kaj iris tra l' aleo de la ĝardeno. La hundo kuris antaŭe.

Subite ĝi malgrandigis siajn paŝojn kaj komencis ŝteliĝi, kvazaŭ eksentinte antaŭ si ĉasaĵon.

Mi ekrigardis laŭlonge la aleon kaj ekvidis junan paseron kun flavajo ĉe l' beko kaj kun lanugo sur la kapo. Ĝi falis el la nesto (la vento forte balancadis la betulojn de l' aleo) kaj sidis senmove, disstariginte senhelpe laflugiletojn, kiuj apenaŭ elkreskis.

Mia hundo malrapide proksimiĝis ĝin, kiam subite, ĵetinte sin el la proksima arbo, maljuna nigrobrusta pasero falis kiel ŝtono antaŭ la vizaĝego mem de l' hundo, — kaj, malordiginte la plumojn, aliĝita, kun malespera kaj mizera pepado saltis du fojojn kontraŭ la dentita malfermita buŝego.

Ĝi jetis sin por savi, ĝi kovris per si mem sian idon... sed la tuta malgranda ĝia korpo tremis pro teruro, la voĉeto sovaĝiĝis kaj raŭkiĝis, ĝi perdis fortojn, ĝi sin oferis!

Kiom grandega monstro devis ŝajni al ĝi la hundo! Kaj tamen ĝi ne povis resti sur sia alta, sendanĝera branĉeto... La forto, pli potenca ol ĝia volo, ĝin jetis de tie.

Mia Trezoro ekhaltis, reiris... Ŝajne tiu ĉi ankaŭ konfesis tiun forton.

Mi rapidis devoki la konfuzitan hundon — kaj foriris, estimegante.

Jes, ne ridu. Mi estimegis tiun malgrandan heroan birdon, ĝian aman atencon.

La amo, mi pensis, estas pli forta ol morto, ol timo je l' morto. Sole de ĝi, de la amo, estas tenata kaj movata la vivo.

Kontenta homo.

Laŭ la strato de la ĉefurbo rapide iras saltetante juna ankoraŭ homo. Liaj korpomovoj estas gajaj, vivaj; la okuloj brilas, la lipoj ridetas, la ravita vizaĝo agrable purpuriĝas... Li la tuta estas kontento kaj ĝojo.

Kio okazis kun li? Ĉu li ricevis heredon? Ĉu oni plialtigis lian rangon? Ĉu li rapidas al la renkonto kun sia amantino? Aŭ, simple, li bone matenmanĝis kaj la sento de l' sano, sento de l' sata forto komencis ludi en ĉiuj liaj membroj? Ĉu, eble, oni metis sur lian kolon vian belan okangulan krucon, ho pola reĝo Stanislavo? *)

Ne. Li elpensis kalumnion pri la konato, vastigis ĝin peneme, ekaŭdis ĝin, tiun ĉi saman kalumnion, el la buŝo de alia konato — kaj li *mem ĝin ekkredis*.

Ho, kiom kontenta, kiom eĉ bona estas en tiu ĉi momento tiu ĉi aminda, esperinda junulo!

Festeno ĉe la Ĉefekzistajo.

Unu fojon la Ĉefekzistajo ekpensis aranĝi grandan festenon en Lia ĉieleblua palaco.

Ĉiuj Virtoj estis de Li alvokitaj kiel gastinoj. Sole la Virtoj... la virojn Li ne invitis... sole virinojn.

*) Rusa ordeno.

Kolektis sin tre multe da ili — grandaj kaj malgrandaj. La malgrandaj Virtoj estis pli agrablaj kaj pli afablaj ol la grandaj; sed ĉiuj ŝajnis kontentaj — kaj ĝentile interparolis, kiel konvenas interparoli al proksimaj parencoj kaj konatoj.

Sed jen la Ĉefekzistaĵo rimarkis du belajn virinojn, kiuj, ŝajne, tute ne estis konataj unu kun la aliaj.

La Mastro prenis la manon de unu el tiuj ĉi virinoj kaj alkondukis ŝin al la alia.

“La Bonfareco!” diris Li, montrinte la unuan.

“La Dankemeco!” aldonis Li, montrinte la duan.

La ambaŭ Virtoj neesprimeble ekmiris: de tiu tempo, de kiam la mondo staris — kaj ĝi staris longe, — ili renkontis sin la unuan fojon.

Orienta legendo.

Kiu en Bagdado ne konas la grandan Ĝiafaron, la sunon de l' universo?

Unu fojon — antaŭ multaj jaroj — li estis tiam ankoraŭ junulo — promenis Ĝiafaro en la ĉirkauajo de Bagdado.

Subite lian aŭdon allugis raŭka krio: iu malespere vokadis helpon.

Ĝiafaro distingigis inter siaj egalaguloj per prudenteco kaj pensemeco; sed la karon havis li kompateman kaj li esperis sian forton.

Li ekkuris kontraŭ la krio kaj ekvidis kadukan maljunulon, alpremitan al la muron de l' urbo de du rabistoj, kiuj lin rabis.

Ĝiafaro ekprenis sian glavon kaj atakis la krimulojn: la unuan li mortigis, la alian forpelis.

La liberigita maljunulo alfalis al la piedoj de sia liberiginto kaj, kisinte la randon de lia vestaĵo, ekkriis: “Kuraĝa junulo, Via grandanimo ne restos sen rekompenco. Laŭ la ekstero mi estas malriĉa almozisto, sed sole laŭ la ekstero. Mi estas homo ne simpla. — Venu morgaŭ, frue matene, sur la ĉefbazaron: mi atendas vin ĉe la fontano — kaj vi konvinkiĝos je la vereco de miaj vortoj.

Ĝiafaro ekpensis: “Efektive, laŭ la ekstero, tiu ĉi homo estas almozulo; tamen ĉio povas okazi. Kial ne ekprovi?” — kaj respondis: “bone, patro mia, mi venos”.

La maljunulo ekrigardis en liajn okulojn kaj foriĝis.

La sekvantan matenon, apenaŭ eklumetis la lumo, Ĝiafaro iris sur la bazaron. La maljunulo jam atendis lin, apoginte sin sur marmoran kalikon de l' fontano.

Silente prenis li la manon de Ĝiafaro kaj alkondukis lin en negrandan ĝardenon, de ĉiuj flankoj ĉirkaŭitan de altaj muroj.

En la mezo mem de tiu ĉi ĝardeno, sur verda herbejeto kreskis arbo de vido neordinara.

Ĝi estis simila al la cipreso; nur la foliaro estis sur ĝi de blua koloro.

Tri fruktoj — tri pomoj — pendis sur la maldikaj, supren fleksitaj branĉetoj: unu, de meza grandeco, longforma, lakte blanka; la alia — granda, ronda, helruĝa; la tria — malgranda, sulkigita, flaveta.

La tuta arbo mallaŭte bruis, kvankam ne estis vento. Ĝi sonoris mallaŭte kaj plende, kvazaŭ ĝi estis vitra; ŝajne, ĝi sentis alproksimiĝon de Ĝiafaro.

“Junulo!” — diris la maljunulo, — “Deŝiru kiun vi volas el tiuj ĉi

fruktoj kaj sciu: se vi deŝiros kaj ekmanĝos la blankan — vi estos la plej saĝa el ĉiuj homoj; se vi deŝiros kaj ekmanĝos la ruĝan — vi estos riĉa, kiel Rotŝild; se vi deŝiros kaj manĝos la flavan — vi plaĉos al maljunaj virinoj. Decidu!... kaj ne malrapidu. Post unu horo la fruktoj velkos, kaj la arbo mem eniros en la mutan profundaĵon de la tero!“

Ĝiafaro mallevis la kapou kaj ekpensigis. — “Kiel en tiu ĉi okazo agi?” diris li duonvoĉe, kvazaŭ konsiligante kun si mem. — “Se vi fariĝos tro saĝa — vi eble ne volos vivi; se vi fariĝos pli riĉa, ol ĉiuj homoj — vin ĉiuj envios; pli bone, sekve, mi deŝiros kaj manĝos la trian, sulkiĝitan, pomon!“


Kaj tiel li faris; sed la maljunulo ekridis per la sendenta rido kaj diris: “Ho, la plej saĝa junulo! Vi elektis la bonan parton! Por kio estas al vi la blanka pomo? Vi sen tio ĉi estas pli saĝa ol Salomono. — La ruĝa pomo estas ankaŭ al vi nebezona... kaj sen ĝi vi estas riĉa. Sed la riĉecon vian neniu envios“.

— “Rakontu al mi, maljunulo“, diris, ekstreminte, Ĝiafaro, “kie loĝas la estiminda patrino de nia de Dio gardata kalifo?“

La maljunulo salutis ĝis la tero — kaj montris al la junulo la vojon.

Kiu en Bagdado ne konas la sunon de l' universo, la grandan, la gloran Ĝiafaron?

Tradukis V. Halperin.



Fantazia revo kun praktika konkludo.

Al multaj el miaj kunideanoj-esperantistoj okazis, mi ne dubas, kiel okazadis al mi, revu pri tiu kara malproksimaĵo, kiam la lingvo internacia fariĝos tio, kio ĝi devas esti — ilo de plenunita proksimiĝeco de diversnaciaj; kiam ĝia ideo kaj ĝia alta celo atingos fine la malakran orelon kaj inercian konsciencon de homoj; kiam ĝia merito estos de ĉie alkonita, kiam ĝi aperigos larĝe ĝian teruran alireblecon, kaj helpos al homoj formeti la katenojn de muteco, nun ankoraŭ multpeze ilin premantajn.

En tia dezirata tempo de libera kaj larĝa komunigo, la *pensu* ricevos vastspacon kaj liberon, devajn al ĝi: ĝi estos en stato trakuri senmalhelpe, pli rapide ol per telegrafaj kondukiloj, tra tuta la mondo, ĉie serĉante por si anojn kaj adeptojn, sumigante eblecojn kaj fortojn, kiuj nun dormetas dividitaj kaj nefruktigitaj.

Kiu ne konfirmus la diron, ke la plej karaj niaj ligoj, la plej bonaj niaj parencaĵoj — estas ligoj per idea unueco, parencaĵoj per elekto. La plej proksimaj al ni homoj estas niaj proksimaj je spirito, tiuj kiuj nin komprenas, nin kunsentas, — certe ne tiuj, kiuj sin trovas en fizika najbareco kun ni. Lingvo internacia donas eblon formovi la limojn de reciproka kompreno kaj elekto trans gentoj kaj gentujoj, tra tuta la mondovasto. Ĝi ne estas nur oportunaĵo, kontentigo de privataj gustoj kaj altiriĝoj; ĝi estas ideo ĉion ĉirkaŭanta, integrilo de homaj spiritoj, koncepto de la plej alta flugo. Ĝi estas antaŭdifinita servi al la plej belaj celoj homaj, homaj *par excellence*.

Kiom da bono oni devas atendi de tia integriĝo de emoj ne inerciaj, sed plej vivaj kaj agantaj! kiom da progreso enportos ĝi en la mondon moralan de homoj! al kiuj pli bonaj societaj *kombinacioj* ĝi servados! Celoj, kiuj nun nur neklare desegniĝas, estos starigitaj fortike kaj malŝancele; iro al ili estos rapidigita. Ni liberiĝos de la multepeza heredo de sovaĝeco kaj mal-lumaĵo, kiuj nun premas ankoraŭ sur ĉiuj vojoj. La rabisteco kaj ŝtelisteco

mallevos kapon kaj ĉesos ilian paradan marŝon kun tamburoj kaj ĥoroj, devigante kaŝi sin en rifuĝo de hipokriteco. La rajtoj je la merito kaj honorindo de laboro estos denove juste trarigarditaj, kaj la malnovaj patentoj — nuligitaj. Ĉiuj emoj kontraŭsocietaj fariĝos kontraŭnaturaj, kaj estos tiel same raraj, kiel nun estas la perforto kontraŭ si mem. La morala puremeco eniros en respekton kaj kutimon pli ol nun la fizika. La scienco kaj scio nombrigos siajn adeptojn en nekredata grado; ili fariĝos objektoj de kulto ne en fetiŝa maniero, sed gajnos spiritojn kaj korojn. Fine, la homo mem, nun ekzistaĵo egoista, malkuraĝa, neantaŭvidanta, submetita al okazo, nekuraĝanta reveni pri spirita lukso, minacata ĉiufanke de perforto... tiam eksaltos spirite, fariĝos vere kuraĝa kaj libera, klarigos por si mem la prezon de la vivo; li estos mem konscia konstruanto de sia propra historio, ne plu sklavo de mallumaj influoj!...

Parolinte tiom da neesteblaĵoj, mi rapidas peti pardonon de bona leganto, kiun mi forkondukis tiel malproksimen sur la vojo de revo. Estas nedube, ke pli proksime al ni staros tute ne tio, pri kio mi ekparolis, kaj — ĝis venos la dezirata renoviĝo, multe da malfacilaj historiaj ŝtupoj estos tramarŝitaj, multe da mallumaj paĝoj transturnitaj, multe da malbono vidita kaj suferita... Unu estas nedubebla — ke la vojo al la boniĝo, kvankam malfacila kaj longa, estas tamen certa: trovas sin en la montrita flanko. Ĝi kuŝas en ligo kaj integriĝo de bonaj niaj emoj, ne bestaj. Tial la rigardoj en malproksimon estas ne vanaj kaj pardonindaj. Nur per ilia helpo oni povas ĝuste orientiĝi. Sen la sentine malproksimaj steloj, ni ja neniam eksciis la figuron kaj verajn mezurojn de la terглоbo, sur kiu ni vivas.

Ligo kaj komuniĝo homaj! Parolinte pri Esperanto estas tre eble transiri al tiuj ideoj. Kvankam nedube mi foriris multe laŭ la fantazia vojo, tamen eĉ tio, kion ni vidas ĉirkaŭ ni en nia ĝermanta afero, igas nin ne perdi kuraĝon. Grupo da homoj, aldonitaj al la nobla ideo de lingvo internacia, ja ĉiam kreskas kaj fortiĝas. En diversaj lokoj de la tero ĝi trovas kaj kolektas anojn, kiuj nur devas sumigi iliajn fortojn por ke la iro de nia ideo prenu tiun movon, kiun en la meĥaniko oni nomas rapidigata.

En foriranta jaro, Esperanto, danke al gravaj kaj neĉesantaj penoj de bona aganto, inokuliĝis kaj radikigiĝis en la bela Francujo. Tie aperis nova ĵurnalo kun alta devizo kaj belaj celoj, kiu *unua* etendis malkovre la manon al la ankoraŭ malforta esperantismo. Ni parolas pri *l'Etranger* kies emoj — proksimigi kaj ligi homojn de egalaj rigardoj kaj celoj, sed dividitajn per lingvo kaj nacieco, estas tute samaj kiel la emoj de l' esperantismo. Ni servas tiun saman Dion, ni staras sub tia sama standardo. Mi jesigas ke neniu esperantisto povas resti nedankema al l'Etranger, ne oferi al ĝi sian sinceran kunsenton.

Ĉiu el ni konsentos, ke por enverŝi en nian aferon plej vivigantan flueron, ni bezonas starigi pli ol ĉio la interkomunikojn de diverslandaj esperantistoj. Korespondado kun diversegaj lokoj kaj lokanoj, komunikoj laŭ diversegaj branĉoj de ago, reciprokaj vizitoj, vojaĝoj, kunvenoj — jen kio konsistigas la vivon kaj floriĝon de esperantismo. Tie estis ĝia vera senco, garantio de ĝiaj estontaj sukcesoj la plej efektiva rimedo por altiri al ni multnombrajn anojn.


La redakcio de l'Etranger institutis ankoraŭ, kiel ni scias, la societon de korespondado internacia "I. C." invitanta ĉiujn partopreni en interkorespondado, fari reciprokajn konatiĝojn, aranĝi reciprokajn interesojn kaj aferojn

en divers-specaj branĉeroj de vivo (7 sekcioj). Tio estas vojo ĝuste mal-kovrita por ni. Profitu ni do je ĝi! Uzu ni la Esperanton por ĝia vera difino. faru konatiĝojn! Konsentu ke la nova rimedo vastigi Esperanton estas inda je nia helpo kaj helpu ĝin energiege.

Sinjoroj kolegoj-esperantistoj! ne negliĝu do anĉi la I. C.

A. Z.


P. S. — Mia artikoleto estas tradiktita per sincera deziro montri veran kunsenton al I. C. kaj l'Etranger. Tamen mi bone scias ke la plej forta igo kuŝas ne en ekkrioj kaj vokoj, sed en ekzemplo. Tial mi subtenas la super-diritan ankaŭ per deviĝo: liveri al la ĵurnalo l'Etranger — 1897 ne malpli ol 25 abonantojn. — A. Z.



Nova vortaro serioza kaj humora.

El lingvo germana-hebrea tradukis *M. Jezenski*.

- AKTORO.** Stranga ekzistaĵo: jen simio, jen cigano, jen maljuna virino, jen heroo, jen kriplulo, jen saĝulo, jen malsaĝulo, jen tio, jen alia, sed perfekta homo — neniam.
- ALTAĴO.** De tie oni povas fali kaj rompi la kapon; sed malgraŭ ke ĝi estas tre danĝera loko, la homoj tamen rampas tien, metante sian vivon en danĝeron.
- AMO** — malvera kalkulilo: du ĝi kalkulas por unu.
- BIFSTEKO.** Por la dentoj de malriĉulo ĝi estas tro malmola.
- BOPATRINO.** La plej bona bopatrino ne egalas la patrinon.
- CIGANOJ.** Popolo, kiu dancas en malsato.
- ĈIRKO** — loko, kie ĉevaloj akiras monon de homoj.
- ĈEVALOJ.** Per ilia forto la homoj fariĝis civilizitaj, kaj ili mem ĝis nun restis ĉevaloj.
- DOLĈE** — ordinare finiĝas maldolĉe.
- DOMI** — tre malfacila laboro, kiun ne ĉiuj povas fari.
- EDZIĜO** — komedio, kiu ordinare finiĝas per tragedio.
- ESPERO** — infana ludilo. Oni ludas kun ĝi, ĝis ĝi rompiĝas aŭ disŝiriĝas.
- FELIĈO.** Multaj homoj sonĝas pri feliĉo ĝis ili ekdormiĝas.
- FILO.** Unu patro povas nutri dek filojn, kaj dek filoj eĉ unu patron ne povas nutri.
- FLORO.** Se eĉ ĝi estas bela kiel la tuta mondo, ĝia radiko devas esti en la tero.
- FRATO.** Frato povas esti ĉiu, kiu havas monon.
- FLATAĴO** — ŝlosilo al ĉiuj koroj.
- HARINGO** — manĝaĵo, kiu donas apetiton al riĉuloj kaj satigas malriĉulojn.
- HONESTO** — antikva komercaĵo; en la nunaj vendejoj ĝi estas malofta.
- KARTOJ** — rabisto, formanĝanta monon, tempon, sanon kaj honoron.
- KORTO** — loko por la malriĉuloj, ne havantaj loĝejon.
- LOMBARDUJO** — returnita mondo: somero estas tie vintro kaj vintro — somero.
- MALSATO** — severa kaj terura koleremulo, pelanta en la randon de la mondo.
- MI** signifas: krom *mi* ne ekzistas alia en la tuta mondo, mi povas ĉion, mi bezonas ĉion, al mi estas ĉio permesita, kaj mi estas nome mi.
- NENIO** — materialo, el kiu Dio kreis la mondon.
- NELO** utilas por la alia sed ne por si mem.
- PETROLO** — fluidaĵo, lumiganta alion, kaj ĝi mem malodoras.
- PLUMO.** La plumoj ankaŭ havas sian sorton: kiam ili venas en la manojn de malsaĝulo — ili skribas sensencaĵojn, eĉ saĝulo — saĝaĵojn; iafoje ĝi povas veni al tiu, kiu per unu guto da inko povas tumultigi tutan Eŭropon. La plej danĝere estas rakonti al ĝi sekreton.
- REDAKCIO** — mensogofabriko.
- SEKRETO.** Virinoj transdonas ĝin unu al la alia.
- SPEGULO.** Similan feliĉon havas neniam objekto en la mondo: ĉiu virino ne povas sufiĉe rigardi en ĝin.
- TERO** — dormoĉambro por ĉiuj vivuloj.
- VERO** — malfeliĉa ekzistaĵo; preskaŭ la tuta mondo malamas ĝin.



Letero de l' tradukinto de "Demono".

En N:o 8 de Lingvo Internacia, en rubriko sub titolo "Novaj eldonoj" (paĝo 150), mi tralegis sekvantan raporton: "Eliris el presejo kaj estas dissenditaj al abonantoj paĝoj 476—482 de la "Biblioteko". Tio ĉi estas rakonto en versoj, originale verkita de s-ro V. Devjatnin kaj havanta la titolon: "Nevola mortiginto." La malnovaj esperantistoj tre bone devas scii la talenton de l' tradukinto de "Demono" kaj nun ni povas nur diri, ke lia talento ne malgrandiĝis dum la sufiĉe longa tempo, kiam li nenion verkis (sic!). Ni povas nur bedaŭri (?), ke s-ro Devjatnin tiom malofte donacas al la esperantistoj siajn belajn (!?) verkojn."

Sendube ĉiu leganto de Lingvo Internacia, aparte el nombro de novaj esperantistoj, pensas, ke tiu ĉi laŭdanta raporto de estimata redakcio devas esti tre agrabla por aŭtoro de "Nevola mortiginto", kaj... mirinde estas diri: ili eraras!...

Por klarigi tion ĉi kaj por restarigi veron, mi humile petas altestimatan redakcion presi en Lingvo Internacia tiun ĉi mian leteron, tiom pli, ke mi opinias ĝin esti interesa ne sole por miaj personaj amikoj-esperantistoj, sed entute por ĉiuj, kiuj interesiĝas je nia lingvo.

Mi unue konatiĝis kun "Esperanto" en Junio de jaro 1892 en Vilno. Tiu ĉi lingvo plaĉis al mi, kaj mi tre rapide ĝin ellernis, tiom rapide, ke en tiu sama monato mi jam povis traduki "Anĝelon" de Lermontov kaj verki unu originalan versaĵon "Printempo" (tiu ĉi versaĵo estas presitaj en N:o 9 de "Esperantisto" por jaro 1892); poste, en Julio, mi skribis mian mizeran originalan rakonton en versoj "Ludilo de sorto" (N:o 12 de "Esperantisto" por tiu sama jaro), kiu komence havis titolon "Ivano" kaj donis per si ekzemplon, kiamaniere oni *ne* devas skribi versaĵn rakontojn... Poste (en Aŭgusto) sekvis miaj versaj tradukoj: "Sarantio", "Libera homo", "Maristoj", "Husaro", kaj, fine *en Septembro de jaro 1892* mi verkis mian malfeliĉan "Nevola mortiginto" (komence ĝi havis titolon "Maljuna ĉasisto" kaj ankoraŭ pli frue — "Sub influo de minuto"). — Tiun ĉi versan rakonton, se oni permesos al mi ĝin tiel nomi, mi, ŝajne kune kun miaj unuaj neprosperaj prozaj tradukoj el Tolstoj, sendis al Peterburga societo "Espero", kiu, ŝajne en jaro 1893, transsendis ĝin al s-ro Zamenhof, kaj nun, laŭ volo de nia estimata majstro, mia *talenta* produktaĵo, al mia grandega bedaŭro kaj honto, ekvidis mondon, kaj ĉiuj esperantistoj povas ĝin uzi, kiel plej efektivan rimedon kontraŭ sendormo... Jen estas vero!

Kiam venis al mi "Biblioteko" kun "Nevola mortiginto", ĉe mi gastadis unu mia bona amiko — fraŭlino Manjkovskaja el Kremenec, — kaj nun, pro nomo de nia amikeco, mi kore ŝin petas *diri prese* sur paĝoj de Lingvo Internacia, por sciigi ĉiujn esperantistojn, kielan impreson mi ricevis de tiu ĉi talenta rakonto, — mi do mem ne kuraĝas tion ĉi fari, por ne elmontri *mian aŭtoran modestecon*... Mi povas nur diri tute sincere, — ke nia juna literaturo nur gajnus, se en ĝi forestus tielaj talentaj produktaĵoj, kiel, ekzemple, miaj "Ludilo de sorto", "Edziĝo", aŭ "Nevola mortiginto"; ke mi estis feliĉa, ke tiuj ĉi miaj talentaj verkoj ne estas lastaj, sed post ili sekvis ankoraŭ "Demono", "Boris Godunov", "Arturo", "Dektria numero", "Malliberulo", "Kverko" k. t. p., — kaj ke mi mem estus nevola mortiginto de mia talento, se "Nevola mortiginto" estus mia lasta verko...

Pri raporto do de estimata redakcio de Lingvo Internacia, skribita en

komenco de tiu ĉi letero, mi estas opiniema, ke ĝi estas nur tre bona ironio, kaj mi ĝin alprenas kun kora danko, kiel indan punon por mia ŝajna perfido al nia kara lingvo. Sed nun mi jam komencis ree laboradi, kaj fruktojn de tiu ĉi laborado mi en plej malproksima tempo prezentos al juĝo de amikoj-esperantistoj. — Dixi!

18^o 11 96.

Tradukinto de Démono.

De la redakcio. — Al ni ŝajnas, ke la estimata tradukinto de Démono tro severe juĝas siajn originalajn verkojn: por ni, kiuj zorgas pri *la lingvo*, la ekstera formo de l' verko, — la reguleco de l' stilo, la beleco de l' esprimoj, la rimoj k. t. p. — estas tiel same gravaj, kiel la interna flanko de l' verko, t. e. ĝia enhavo. La stilo de s-ro Devjatnin estas bela kaj regula — tiujn ĉi malnovajn indojn de lia nova verko ni signis, kiam ni parolis pri lia talento de *tradukisto*.



Respondoj al la demandoj

en n^o 8, p. 163.*)

1. La "propraj" nomoj estas "propraĵoj" de la nacioj al kiuj ili apartenas, sekve tute ne estas "internaciaj." Oni tial skribu ilin laŭ la ortografio de tiu nacio al kiu ili estas propraj. — Por la nomo de l' antikveco, oni uzu la ortografion latinan; ĉar tiu estas pli bone konata ol la greka. Ekz. oni skribu *Thucydides*, *Aeschylus* kaj ne "Thoukudides", "Aiskhulos". — En la okazo ke ia nacio ne uzas la latinajn literojn, oni tiam skribu laŭ la ortografio Esperanta. — La nomojn jam "tutmondajn"; Eŭropo, Azio, Francujo k. t. p. oni skribu laŭ formoj de s-ro d-ro Zamenhof.

Tacoma U. S. A. 25-XI-96.

R. Geoghegan.

4. Eble estas dezirinde sed tute ne estas grava afero. Se iu supozas ke la legantoj ne bone povas elparoli tiun aŭ tiun ĉi nomon sen pliklarigo, li povas — laŭ propra sia bonjuĝo — tre facile aldoni tian pliklarigon.


R. G. n.



Ni petas reaboni.

Por eviti malordon ĉe la dissendado de la unuaj numeroj de "Lingvo Internacia" en la sekvanta jaro 1897 ni tre petas tiujn esperantistojn, kiuj deziras ricevadi plu nian gazeton, aboni ĝin *ĝustatempe*, aŭ almenaŭ sciigi la redakcion pri sia deziro esti abonanto en la venonta jaro. La kondiĉoj de la abono restas la antaŭaj, t. e. 3 kronoj = 3,30 germ. markoj = 4,25 frankoj = 800 rejsoj = 1,50 rubloj por la jara ekzemplero, kaj unu senpaga ekzemplero al ĉiu, kiu alsendos al ni 4 pagajn abonojn.

La abonantojn, kiuj abonos la "Lingvon Internacian" per la poŝto, ni petas sendi al ni siajn adresojn, por ke ni povu ilin presi en la gazeto.



*) Al la demando 1:a oni trovas aliloke en nia gazeto alian pli vastan respondon.

Adresaro de niaj abonantoj.

Anglujo.

487. Waite, Davis, d-ro. 37 Westbowin Park Road, Bayswater, London W.

Austrujo.

488. de Brzostowski, Aleks. Bolesl. Zamajski-Strasse 9. Lemberg, Galizien.

Portugalujo.

473. Marques, Francisco Pinto. Rua dos Fanqueiros. N^o 7—2^o. Lisboa.
479. 480. Aranjeo Pereira, Gouveia.

Rusujo.

448. Frankovskaja, T., s-rino. Jekaterininskaja 17. Sevastopolo.
449. Bejrafi, David. Toropec (gub. de Pskov), imenie Dubno.
450. Šilman, M. Skvira (gub. de Kiev) [Miropolski].
451. Espero. S.-Peterburgo.
452. Florel. S.-Peterburgo. [Espero].
453. Monkevič. S.-Peterburgo. [Espero].
454. Postnikov. S.-Peterburgo. [Espero].
455. Sutkovoĵ, A. Kannaja 8. Ĥarkov. [Espero].
456. Poder. S.-Peterburgo. [Espero].
457. Papp. S.-Peterburgo. [Espero].
458. Pavlova. S.-Peterburgo. [Espero].
459. Rozenblum, T., d-ro. Mejirečje (gub. de Sedlec).
460. Serkov, N. G., Znamenskoje počto-roje otdelenie (gub. de Smolensk). (De VII, 1896 ĝis VII, 1897).
461. Pokrassa, P. M., Brusilov, (gub. de Kiev). [I. Kaminski].
462. Felner, 1-a gimnazio. Tiflis.
463. Zdanevič. 1-a gimnazio. Tiflis.
464. Solovjev. Str. Arsenalnaja, d. de Ĥaĝi-Minasov. Tiflis.
465. Priselkov. Novo-Karganovskaja 20. Tiflis.
466. Aušev. Novo-Karganovskaja 16. Tiflis.
467. Bohenski, J. Predmestje Praga, str. Radiminskaja, 12 loĝ. 8. Varsovio.
468. Tessel, V. Bazarnaja. 87, loĝ. 16. Odeso. [Miropolski].
469. Nevelštejn, J. N. Meščanskaja, d. de Veltman. Ĥerson. [Ĵivotovski].
470. Natanzon, S. Bankiera kontoro de E. S. Livšie. Ĥerson. [Ĵivotovski].

471. Soliterman, L. Skvira, (gub. de Kiev) [Miropolski].
472. Vladikin, F. N. St. Vasiljersčina, (gub. de Novgorod).
474. Mogilenski, E. A. M. Smela, (gub. de Kiev).
475. Evstifejev, N. P. Kontoro de inĝeniero E. K. Knorre. Krasnojarsk.
476. Semencev, I. I. St. Ĵukovskaja, de Riga-Orlovskaja fervojo. (gub. de Orel).
477. Rejner, V. Dvorjanskaja, d. de Kalmanok. Rjazan.
478. Ĥackelevič, V. S. Skvira, (gub. de Kiev). [Miropolski].
481. Petrjajevski, K. Poručik Ĥvalinskaho rezervnaho bataljona. Sarator.
482. Homburger, P. J. Tovariščestvo K. F. Depre. Moskvo.
483. Ĥojnacki, A. Varsovio, antaŭurbo Praga, st. Loĥovskaja, 8.
484. Klimov, poručik Vetluĵskaho rezervnaho bataljona. Kazan.
485. Kantor, B. Bazarnaja, 77. Odeso. [Miropolski].
486. Spiridonov, N. J. Meensk, (gub. de Orel), Aljabjevski Zavod.
487. Proskurjakov, P. S. Učitelskaja Seminaria. Krasnojarsk. [P. Kadik].
488. Kargopolov, D. S. Muĵskaja gimnazija. Krasnojarsk. [P. Kadik].
489. Karklin. Apteka Smirnova. Krasnojarsk. [P. Kadik].
490. Sermus. Apteka Obščestva Vračeĵ. Krasnojarsk. [P. Kadik].
491. Bot. Apteka Obščestva Vračeĵ. Krasnojarsk. [P. Kadik].
492—493. Kadik, P. Krasnojarsk.
494. Slucki, A. Korsun, (gub. de Kiev).
495. S-rino Raisa Kabilina. Poste restante. Varsovio.
496. Legejo de la studentaro de la universitato. Varsovio.
497. Ĥiršberg, H., d-ro. Toropec, (gub. de Pskov). [D. Bejrafi].

Svedujo.

498. Bengtsson, U. Styrmansgatan 7. Stockholm.
499. Modig, Mauritz, librotaranto. Hernösand.
500. Ström, Ragnar. Hernösand.

Novaj adresoj:

7. Gaston Maillard, rue du Four. Seeaut, (Seine), Francujo.
8. Antoine Frenay. 68 rue de l'Ouest. Paris, Francujo.
9. S-rino Hutclimson-Wright, 4 Boulevard du Théâtre. Genève, Svisujo.
10. Valdemar Langlet, Klostergatan 4, Uppsala.

El Heine.

En mirindege-bela Maj
 La floroj malfermiĝis.
 Kaj mia suno-amo
 En mia kor leviĝis.

En mirindege-bela Maj
 Dolé-kantis la birdaro.
 Kaj mi la kor-dezirojn
 Konfesis al la kara.

A. Kofman.

ANONCOJ.

La Liro de la Esperantistoj.

Tiu ĉi verko, kiu enhavas grandan multon da versaĵoj kaj kantoj el la plej bonaj tradukaĵoj kaj versaĵoj ankaŭ multajn originalajn verkojn de la plej eminentaj inter la Esperantistaj skribantoj, estas tre bele ornamita libro kun bonega enhavo. La eldonanto uzas kelkajn proprajn formojn kaj manierojn mallongigi precipe la kunrilatajn pronomojn kaj adverbojn, sed malgraŭ la tielaj "neesperantaj" ideoj — pardonu la esprimon — la libro estas entute tre bonega kaj rekomendinda. Tial ni havas la opinion, ke ĉiuj, kiuj amas nian lingvon, farus bone, aĉetante tiun ĉi libron (kies kosto estas 1 fr. 50 cent.). Oni povas ricevi ĝin ĉe la

Klubo Esperantista en Uppsala.

aŭ ĉe

s-ro V. Gernet en Odeso.

Depot' da semoj de M. I. Fedorovski

estas transkondukita en alian domon. La nova adreso estas:

Rusujo, Moskvo, Mjasnickaja, domo de Staĥejev, kontraŭ la domo de Liphart.

Vlad. Mih. Fedorovski

ŝanĝis loĝejon kaj petas siajn korespondantojn adresadi leterojn tiel: *Moskvo, Mjasnickaja, domo de Staĥejev, kontraŭ la domo de Liphart, en depoton da semoj de M. I. Fedorovski, al V. M. Fedorovski.*

Eliris el presejo N^o 87 de nia literaturo

FANTOMOJ,

rakonto de *V. Korolenko.*

El lingvo rusa tradukis *V. Gernet.*

La verko kostas 0,90 fr. 0,35 rub. (kun transendo 1 fr. 0,40 rub.). La monon oni povas sendi en poŝtaĵoj.

Oni povas ricevi la libron de la **Uppsala Esperantoförening**, de s-ro **L. de Beaufront**, de d-ro **Zamenhof** kaj de la tradukinto.

Bankiera Domo HENRIH BLOKK

en *S.-Peterburg* vendas

biletojn kun gajnoj de la 1-a, 2-a kaj 3-a (Dvorjana) pruntoj kun iam-post-iamaj pago. — La antaŭdono estas 20,15 kaj 12 rubl. por unu bileto. — La ĉiumonata pago — 10 aŭ 5 rubl. — La reprezentanto por Odeso:

La 2-an de januaro estos tirajo de la 1-a prunto.

Jakov Lipovic Hersenevit,

la sola reprezentanto por Odeso kaj Suda Rusujo de modaj ĵurnaloj de ĉiuj landoj de l' mondo, abonado kaj ponumera vendado. — Akceptado de asekuroj de l' vivo de la asekura societo "Zabotlivost". — Kafo "Hektor". — Reprezentanto de la firmo de Jozevski en Kiev por la vendado de mueliloj de fratoj Zek en Drezden. — Apartenaĵoj por mueliloj, svisaj kribriloj k. c. — Akceptado de la reprezentadoj. Oni bezonas agentojn. — Odeso, *Riŝeljevskaja 25 22.* — Telegramoj: **Odessa — Hersenevit.**

La gazeton **Lingvo Internacia** oni abonas:

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- „ **Portugalujo** ĉe dro Costa e Almeida, *Rezende*.
- „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Puŝkinskaja, 44, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.

En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

Nobla rusa familio

en la urbo Borisoglebsk invitas francinon aŭ svisinon de aĝo inter 18 kaj 25 jaroj por ofico de vartistino al kvarjara knabo. La plej gravaj kondiĉoj estas tiaj: oni proponas la salajron 15 rublojn monate kaj krom ĝi la plenan alian provizaĵon: loĝejon, manĝotablon (kune kun gesinjoroj kaj infano), lavadon de tolaĵo kaj cet. Oni postulas, ke la vartistino estu sana, posedu la regulan francan parolon (ne ian provincaŭ dialekton) kaj sciu nur pli aŭ malpli regule nur legi kaj skribi france.

Pri la detalaj kondiĉoj oni petas sin adresi al **S-ro Kazi-Girej**: Rusujo, st. Borisoglebsk de Sud-Orientaj fervojoj. Skribi esperante, france aŭ ruse. Oni petas sciigi la adreson. Mi esperas, ke amikoj esperantistoj ne rifuzos la helpon por trovi la deziratan.

S-ro A. Zakrjevski

ostas agento de la lingvo Esperanto en Smolensk. Ĉiu esperantisto, kiu deziras vastigi ian anoncon, folieton k. t. p. pri nia lingvo, volu sin turni al li. La adreso de s-ro Zakrjevski estas:

Rusujo, Smolensk, Officerskaja sloboda, domo de Erdeli.

Ĉe la tolkudrejo de M. Hizder

estas antaŭnelonge fondita

speciala lavejo.

Oni akceptas por lavado tolaĵon, lanaĵon kaj silkaĵon de ĉia speco. Laŭ la deziro de la mendantoj oni liveras la tolaĵon hejmen. *Oni parolas en Esperanto.*

Odeso, Neĵinskaja, domo de Spandoni,
54 — 6.

Ĉiu paginta por kvar ekzempleroj de la **“Lingvo Internacia”** ricevas la kvinan

senpage.

S-ro Dettling

en Kremenĉug (*Rusujo, gubernio de Poltava*) invitas lokajn kaj traveturantajn esperantistojn vizitadi lian **“Kafejon de Wien”**. Tie ili povas ricevi kafon, teon, ĉokoladon, bieron kaj vinon. — Tagmanĝo kaj vespermanĝo. — Ŝakoj kaj domino. — 16 gazetoj kaj ĵurnaloj. — **“Lingvo Internacia”**, **“L' Etranger”** kaj ĉiuj novaj eldonoj en Esperanto.

Agento-Komisiista Kontoro de M. Dettling en Kremenĉug akceptas mendojn en Esperanto.

Eldono de la societo **“Espero”**

”KAIN”

de lord Byron

Kosto: 1 franko = 70 ore = 80 pfeu. = 40 kop.

La libro estas ricevebla de:

1. *Societo “Espero”*. (Peterburgo, O. Beker, Podolskaja 10, aŭ N. Borovko, Naberejnaja r. Karpovki, 20).
2. *L. Zamenhof*, Grodno.
3. *V. Gernet*, Odeso, Puŝkinskaja, 44.
4. *Klubo Esperantista en Upsala*.

Rabato: ĉe 100 ekz. — 40 % ĉe 50 ekz. — 20 %.

Mi petas ĉiujn esperantistojn sendi al mi adresojn de iliaj konatoj kaj aliaj personoj de librovendejoj kaj bibliotekoj en iliaj urboj, por ke mi povu dissendadi laŭ tiuj ĉi adresoj propagandajn broŝurojn, folietojn, lernolibrojn, leterojn k. t. p. *V. Gernet*, Odeso, Puŝkinskaja, 44.